

1973 oktobro
66-a jaro
n-ro 814 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



HOMAJ RAJTOJ

ĉi tiun numeron iom dudirekta: unuflanke ĝi ankoraŭ volas plenumi niajn promesojn detale raporti pri la satelitaj eventoj ĉirkaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto; aliflanke ĝi rigardas antaŭen al la 25-jara datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (en decembro) kaj, per la enmetitaj aliĝilo kaj Oficiala Bulteno, al la venonta Universala Kongreso en 1974. Ni aparte rekomendas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj utiligi la datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (la 10an de decembro) por diskonigi tiujn rajtojn inter siaj membroj kaj inter la vasta publiko. La lokaj societoj, ekzemple, povas — eventuale kunlige kun la Zamenhof-Tago (la 15a de decembro) — aranĝi prelegojn aŭ pli ampleksajn kaj solenajn programojn, aperigi artikolon en loka ĵurnalo aŭ revuo ktp. Por ĉiuj tiaj agadoj la ĉi-apuda ĉefartikolo de la prezidanto de UEA, kun klara substreko de la graveco de la lingvaj rajtoj de la homo, formas bone utiligeblan bazon.

Enhavo

- 161 Lingvaj rajtoj kaj lingva diskriminacio (Lapenna)
- 162 Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio diskutas pri la reala forigo de lingva diskriminacio
- 164 29a Kongreso de TEJO en Sarajevo (Eichhorn)
- 166 Dokumentoj de Luksemburgo
- 167 Postkongreso en Ateno: Kultura turismo (Wells)
- 167 13a Internacia Infankongreseto: Eta Mondo en Pionirski grad
- 168 41a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj
- 168 Fakaj laboroj de la 58a UK: Svarmo da kunsidoj
- 170 Eŭgeno Miĥalski (Conterno)
- 170 Recenzoj
- 172 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 173 Nekrologoj Helfers, Rytjkov, Bourgeois, Gabalda
- 173 Komunikado de Internacia Esperanto-Instituto
- 174 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 176 Komenco bona — ĉio bona
- 177 59a Universala Kongreso, Hamburg, 1974
- 178 Esperanto en radio
- 178 Kial la kotizoj altiĝos? (Woessink)
- 179 Oficiala informilo n-ro 471
- 180 Anoncetoj

La kovrilo

Ĉiu havas la rajton je edukiĝo (Universala Deklaracio, artikolo 26). Kiel atentigas prof. Lapenna en sia ĉefartikolo, tiu rajto implicas ankaŭ lingvajn rajtojn sen diskriminacio. Milionoj da infanoj tra la mondo ne povas ricevi edukon pere de sia gepatra lingvo en la lernejoj, sed ili devas akiri sian scion tie, kie ajn ili nur povas: ĉe tiuj parencoj, kiuj por ili trovas tempon. Foje kulpas pri tio objektivaj problemoj kiel la malgrandeco de la koncernaj minoritatoj, sed alifoje kulpas klopodoj de la koncerna registaro, subpremi aŭ elimini la minoritatan lingvon por pli facile ensorbi ĝian popolon en la pli grandan nacion. (Foto: Unuiĝintaj Nacioj)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1882-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

Lingvaj rajtoj kaj lingva diskriminacio

La preciza datreveno de la akcepto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas la 10a de decembro. Ĉi tiun artikolon ni publikigas jam nun, por ke la Esperanto-societoj kaj aliaj organizaĵoj povu ĝin utiligi ĝustatempe en sia programo.

La Ĉarto de UN eksplicite rekonas la principon de egaleco de ĉiuj homoj senkonsidere al diferencoj rasaj, seksaj, *lingvaj* aŭ religiaj. La Enkonduko al la Ĉarto rekonfirmas la fidon je la egalaj rajtoj de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj. Art. 1 de la Ĉarto mencias la respekton al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj "por ĉiuj sen distingo de....*lingvo*" kiel unu el la ĉefaj celoj de la Organizaĵo. En la sama maniero la egaleco de lingvoj estas rekonita ankaŭ en Art. 13, 55, 73, 76.

La Konvencio pri Prevento kaj Punado de la Krime de Genocido, akceptita de la Ĝenerala Asembleo de UN en 1948 kaj intertempe ekvalidinta, difinas tiun krimon kiel ekstermon de nacia, etna, rasa aŭ religia grupo kiel tia per kiu ajn el la agoj difinitaj en la Konvencio. La projekto de la Konvencio enhavis ankaŭ la koncepton de la t.n. kultura genocido. Ĝi estis difinita kiel krimo farita "per diversaj agoj, kiaj estas malpermeso utiligi la lingvon de la grupo en la ĉiutagaj rilatoj aŭ en la lernejoj aŭ presigi aŭ disvastigi publikaĵojn en la lingvo de la grupo". La "kultura genocido" elvokis grandajn diskutojn kaj fine estis rifuzita. Tamen, tiukaze estis klare dirite, ke eblos preventi en la estonteco tiujn agojn, kiujn la proponintoj deziris enmeti en la nocion de kultura genocido, per la observado de la kulturaj rajtoj, formulotaj en la Universala Deklaracio.

Efektive, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, akceptita la 10an de decembro 1948, listigas ĉiujn fundamentajn liberecojn kaj homajn rajtojn, inkluzive la kulturajn. Ĝi rekonfirmas la principon, ke ĉiuj rajtoj kaj liberecoj validas por ĉiuj homoj "sen kia ajn diferencigo laŭ....*lingvo*" (Art. 2). La rajto peti, ricevi kaj havigi informojn (Art. 19) kaj la rajto je edukiĝo (Art. 26) implicas la lingvajn rajtojn sen diskriminacio.

En decembro, 1966, la Ĝenerala Asembleo de UN unuanime akceptis du paktojn kaj la t.n. fakultativan protokolon por la apliko de la Universala Deklaracio.

La Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj rilatas ĉefe al la klasifaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Pluraj artikoloj enhavas regulojn pri la lingva egaleco. Ekzemple, Art. 2 preskribas, ke la Ŝtatoj-Partioj devontigas sin certigi al ĉiuj individuoj ĉiujn rekonitajn rajtojn senkonsidere al ilia *lingva* aparteno; Art. 4 eksplicite malpermesas *lingvan* diskriminacion; Art. 24 denove mencias la *lingvan* diskriminacion en ligo kun la rajtoj de neplenaĝuloj. Simile, la lingvaj rajtoj estas rekonitaj en Art. 14, 25, 26 kaj 27. Tiu lasta

eksplicite garantias la rajtojn de minoritatoj, precipe la rajton ĝui sian propran kulturon kaj uzi sian lingvon.

La Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj rekonas en Art. 1 la rajton de ĉiu popolo "libere decidi pri....sia kultura evoluo", dum Art. 2 garantias la realigon de ĉiuj rajtoj difinitaj en la Pakto "sen diskriminacio....*lingva*". La sama principo estas entenata en Art. 13-15, kiuj rilatas al la rajtoj sur la kampo de edukado kaj kulturo.

Eĉ senkonsidere al la Paktoj, la lingva egaleco estas hodiaŭ rekonita ne nur morale-politike, sed ankaŭ jure surbaze de la Universala Deklaracio en ligo kun la respektivaj artikoloj de la Ĉarto. Tio signifas, ke oni povas paroli pri diskriminacio ne nur el vidpunkto de la postulatoj de etiko, sed ankaŭ laŭ internacia juro.

Kio, do, estas diskriminacio?

La Konvencio kaj Rekomendoj kontraŭ Diskriminacio, akceptita de Unesko en 1960, difinas diskriminacion en edukado kiel "kian ajn diferencigon, ekskludon, limigon aŭ preferon, kiu, estante bazita sur raso, haŭtkoloro, sekso, *lingvo*, religio, politika aŭ alia opinio...., celas aŭ kaŭzas nuligon aŭ malpliigon de egaleca traktado en edukado". Tiu difino estas aplikebla al kiu ajn formo de diskriminacio, inkluzive la lingvan. Sekve, la lingva diskriminacio estas malegala traktado de lingvoj, resp. de lingvaj komunikaĵoj aŭ de iliaj individuaj apartenantoj, ĉu sur internacia nivelo, ĉu en la kadroj de unuopaj ŝtatoj. Kiel ĉiu alia diskriminacio, ĝi esprimiĝas ĉefe en du formoj: objektiva, nome kaŭzita de la fakto mem de multlingveco, kaj subjektiva, t.e. en formo de antaŭjuĝoj pri la diskriminacitaj lingvoj, pri la kulturaj valoroj kreitaj en ili, aŭ en formo de malavantaĝoj por unuopuloj.

Sur internacia nivelo la oficialigo de kelkaj lingvoj malavantaĝe de la aliaj, la apliko de la t.n. "laboraj lingvoj" kontraŭ la interesoj de la oficialaj kaj de ĉiuj aliaj; la malegala traktado de unuopaj "laboraj lingvoj" — prezentas per si mem lingvan diskriminacion. Tion pruvas, interalie, la akraj lingvaj disputoj en la sino de UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj. La lingva situacio en interŝtataj organizaĵoj kaj privataj internaciaj asocioj signifas gravan diskriminacion rilate al ĉiuj lingvoj, kiuj ne posedas la privilegian pozicion de oficialaj aŭ eĉ laboraj. Kaj tio okazas en internaciaj organismoj kaj instancoj, kiuj mem proklamis la lingvan egalecon kaj malpermesis diskriminacion.

En la kadroj de unuopaj ŝtatoj, precipe en la multnaciaj kaj en tiuj kun grandaj naciaj minoritatoj, la altrudado de unusola tutŝtata lingvo, la malebleco por la malpli fortaj nacioj aŭ naciaj minoritatoj uzi la propran lingvon en edukado, literaturo, radio, televido,

Lingvaj rajtoj

(daŭrigo)

antaŭ kortumoj ktp., signifas lingvan diskriminacion, kiu kelkfoje atingas la formon de kultura genocido.

La ekzemploj de malobservado de la kulturaj rajtoj, el kiuj sendube la plej grava estas la rajto uzi sian propran lingvon, abundas ĉie en la mondo. Apenaŭ ekzistas ŝtato, kiu ne frontus tiun problemon. En kelkaj landoj oni almenaŭ provas respekti la lingvan egalecon, sed en multaj aliaj la centraj aŭtoritatoj konscie neglektas la lingvajn rajtojn de aliaj nacioj kaj naciaj minoritatoj.

Alia aspekto de la lingva batalo estas la altrudado de la naciaj lingvoj fare de la grandaj nuntempaj imperismoj en la sferoj de iliaj ekonomiaj kaj politikaj intereso. Tio siavice endanĝerigas la malpli fortajn lingvojn kaj minacas la kulturan detruon de tutaj lingvaj komunajtoj.

* * * *

Se ne ekzistus solvo, kiu ebligas plenan egalecon de lingvoj kaj naciaj kulturoj, tiam oni devus rigardi la skizitan staton kiel objektive necesan kaj sekve neŝanĝeblan. La organizita Esperanto-Movado, unuafoje ĝia Centro de Esploro kaj Dokumentado, montris per multnombraj studoj kaj analizoj, ke la sola ebla solvo, kiu — aldone al ĉio alia — efike garantias la lingvan egalecon kaj malebligas kian ajn formon de lingva diskriminacio, estas la akcepto de la Internacia Lingvo. En la nuna momento la grandaj lingvaj imperismoj kaj iliaj satelitoj rifuzas eĉ konsideri tiun rimedon. Ili ja luktas inter si — jen venkas, jen suferas malvenkojn, — sed ili ĉiuj unuiĝas en sia kontraŭstaro al la Internacia Lingvo, kiun ili rigardas kiel danĝeran minacon por la propraj pozicioj. Tamen, la tuta evoluo teknologia, la ĉiam pli granda interdependeco de la diversaj mondopartoj, la neceso integriĝi en pli vastaj ekonomiaj kaj politikaj unuoj, sed la aliflanka deziro de la nacioj konservi siajn naciajn identecojn kaj siajn naciajn lingvojn, puŝas la homaron al tiu sole racia solvo. Pli aŭ malpli frue ĝi certe okazos. Kaj tio per si mem forigos kiun ajn formon de lingva diskriminacio.

Prof. D-ro Ivo Lapenna



SOCIALISMA UNUIĜO DI

Kiel promesite en la septembra n-ro de la revuo, ni jen revenas al la tiam menciita Deklaracio de Slovenia Esperanto-Ligo kaj Amikoj de Esperanto en Slovenio. Kialoj por pli ampleksa prezento de la Deklaracio kuŝas en la fakto, ke ni la entreprenon de Slovenia Esperanto-Ligo konsideras esti unu el tiuj gravegaj, ne tiel ofte okazantaj, precedentaj paŝoj, kiuj povus decide influi la nunan pozicion de la Internacia Lingvo.

La tuto komenciĝis jam pasintjare, kiam (kiel ni skribis en la novembra n-ro de 1972, p.182) 60 komunumestroj (el 60 enketitaj komunumoj!) pozitivis reagis al ĉiuj kvar demandoj en enketo de Slovenia Esperanto-Ligo. La enketo mem ne temis pri flankaj, sed ĝuste pri kernaj demandoj ligitaj al la Internacia Lingvo: instruado pere de televidaj kursoj, regulaj informoj pri la tutmonda Esperanto-movado en la slovenaj radio, televido kaj ĵurnaloj, subteno al pli vasta instruado de la Internacia Lingvo en lernejoj. Se ĉio limiĝus je tiuj personaj deklaroj de la slovenaj urbestroj, eble tio eĉ ne estus tiomgrade surpriza, ĉar ne maloftas dolĉvortaj deklaroj de gravuloj lokaj, landaj aŭ internaciaj. En Slovenujo oni penetris pli profunden kun la enketo, kies plej gravaj rezultoj povus jene resumiĝi: jese respondante ĉiujn kvar enketajn demandojn kaj pagante difinitan sumon por ankaŭ tiamaniere esprimi sian apogon, "amikoj de Esperanto" fariĝis: 44 komunumoj, 378 elementaj kaj 121 mezaj kaj superaj lernejoj; 435 pedagogoj el 40 komunumoj aliĝis (je la kosto de siaj lernejoj) al porinstruista kurso de la Internacia Lingvo.

La enketo klare montris, ke la neesperantista publiko estas multe pli interesita pri la problemaro de komuna lingvo, ol esperantistoj kutimas supozi; ke "nia afero" ĝuas multe pli da simpatio kaj apogo, ol ni mem emas kredi. La slovena enketo plie pruvas, ke la plej oftaj plendoj de la esperantistaro, ke ĝuste en la industrie evoluintaj mondopartoj, pro la tiea vivritmo, daŭre malkreskas la intereso pri la Internacia Lingvo kaj ĝia movado, — Slovenujo estas ja tiu parto de Jugoslavio, kiu laŭ sia vivnivelo pleje proksimas al la t.n. postindustria socio de la Okcidenta Eŭropo. Tial la rezultoj de la enketo klare starigas jenan demandon: ĉu la kutimaj plendoj de la esperantistaro pri nefavoro de la ekstera mondo ofte ne baziĝas sur feblaĵoj aŭ nekapabloj de la esperantistoj mem? Krome, la slovenaj esperantistoj havis ankoraŭ unu kvaliton, kiu en nia movado ne tiom oftas — ne nur komenci bone iun entreprenon aŭ kampanjon, sed ankaŭ bone utiligi ĝiajn rezultojn. Nome, surbaze de

Membroj de UN-Komisiono diskutas la malneton de la Universala Deklaracio. Nov-Yorko, 1949. Maldekstre: D-ro Charles Malik (Libano) kaj Prof. René Cassin (Francujo); dekstre: S-ino Eleanor Roosevelt (USA).

PRI LA REALA FORIGO DE LINGVA DISKRIMINACIO

la vere neatenditaj, mirige favoraj rezultoj de la enketado, Slovenia Esperanto-Ligo ellaboris, ne porokazan, sed principan deklaron pri la lingva problemo. Kun iom longa enkondukita parto, skize sed elĉerpe prezentanta la lingvan problemon en la hodiaŭa mondo, kaj aparte en Jugoslavio, kiu, laŭ la Deklaracio, estas tiurilate "miniatura mondo kun ĉiuj ĝiaj antagonismoj", tiu ĉi dokumento celis mobilizi sociajn kaj politikajn forumojn en tiu jugoslavia respubliko tiel, ke ili alprenu klaran starpunkton, principan kaj

Surbaze de la supraj premisoj ni
deklaras,

ke en rilatoj inter la popoloj kaj ŝtatoj la demokrateco kaj egalrajteco devas esti respektata ankaŭ en la uzado de lingvoj;

ke ni malakceptas la altrudadon de fremdaj naciaj lingvoj al nia kaj al ĉiu alia popolo kaj tial ankaŭ ni rezignas altrudi nian nacian lingvon al homoj, apartenantaj al aliaj popoloj kaj naciecoj;

ke estu respektata ĉiu nacia lingvo kiel integra parto de popola individueco kaj esprimo de nacia aparteno; en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj neniu privilegio estu donata al iu ajn nacia lingvo, ĉar el tiu privilegio naskiĝas novaj sociaj diferencigoj en kultura, ekonomia kaj politika sencoj.

Ni opinias,

ke lingvajn problemojn oni devas solvi laŭ la samaj principoj inter ĉiuj lingvaj grupigoj, inter la grandaj kaj malgrandaj popoloj kaj naciecoj, inter lingvaj majoritatoj kaj minoritatoj. Tiuj samaj principoj validu ankaŭ en rilatoj inter la ŝtatoj kaj inter la popoloj kaj naciecoj en multnaciaj ŝtatoj.

Ni konstatas,

ke ĉiuj ĝisnunaj formoj, uzataj en la solvado de la lingva problemo, restis ne nur neefikaj, sed ili eĉ pli komplikis ĝin pro la neglektado de la supraj principoj. Tial ni

proponas

jenan solvon de la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj kaj naciecoj:

- 1-e ke ĉiu principe rezignu uzi propran nacian lingvon en rilatoj kun la aliaj popoloj, kaj
- 2-e la Internacia Lingvo Esperanto fariĝu la dua lingvo por ĉiu kiel komuna lingvo por internacia uzo kaj esprimo de aparteno al la pli larĝa homa komuneco. Ĝi ja estas samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu.

SLOVENIA ESPERANTO-LIGO
kaj AMIKOJ DE ESPERANTO en SLOVENIO

fundamentan, sur kiu baziĝu la plua respublika kaj federacia politikoj rilate la lingvan problemaron. Por kompreni la pluan evoluon de la eventoj lige al tiu ĉi dokumento, la leganto konatiĝu kun la esenca parto de la Deklaracio mem, citita ĉi-apude.

Kiam tiu ĉi dokumento estis akceptita de siaj subskribintoj, ĝi iris al la Respublika Konferenco de la Socialista Unuiĝo de Slovenujo. Trovinte la Deklaracion apoginda kaj akceptinda, la Respublika Konferenco prezentis ĝin al la Federacia Konferenco de la Socialista Unuiĝo de Jugoslavio, kiu traktis ĝin en sia plenum-forumo kaj aparte pridiskutis ĝin ankaŭ kun reprezentantoj de la jugoslavia Esperanto-movado, antaŭ ol ankaŭ siaflanke trovi la Deklaracion apoginda. Tamen, sekvante la kutimajn jugoslaviajn vojojn, la Federacia Konferenco dissendis la tekston de la dokumento al la koncernaj forumoj de la ses jugoslaviaj respublikoj kaj du aŭtonomaj provincoj, petante, ke tiuj forumoj traktu la dokumenton kaj alprenu siajn starpunktojn, antaŭ ol la Federacia Konferenco oficiale deklaru sin pri la afero.

Pro ĉio ĉi, dum la 58a UK en Beograd, la Deklaracio estis tiel ofte menciata kaj aludata (interalie en la salutparolado de la reprezentanto de la Alta Protektanto, s-ro Veljko Milatović, kiu estas la prezidanto de tiu Federacia Konferenco). Kvankam tiutempe ne estis konataj la starpunktoj de ĉiuj respublikaj kaj provincaj forumoj, jam en Beograd estis certe, ke la Deklaracion subtenos krom la slovenia forumo de la Socialista Unuiĝo ankaŭ tiu de la respubliko Bosnio kaj Hercegovino. Tia anticipa simpatieco de la Federacia Konferenco kaj ĝia prezidanto s-ro Milatović aŭguris bonajn novaĵojn ankaŭ el la aliaj partoj de la lando.

Tamen, por tiuj, kiuj ne tute bone orientiĝas en la jugoslavia socio, necesas diri, ke la Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio estas speco de politika partio (kvankam ne temas pri la klasika senco de tiu vorto), pere de kiu esprimiĝas la plej ĝenerala volo de la jugoslaviaj popoloj, pere de kiu la jugoslaviaj civitanoj decidas kaj efektivas ĉiujn esencajn aferojn en la socia kaj politika vivo de la lando. Cetere, en la 21-miliona Jugoslavio, la Socialisma Unuiĝo nombras ĉirkaŭ 8 500 000 membrojn. Se pri la Deklaracio, kiun iniciatis la slovenaj esperantistoj, pozitive esprimiĝos la Federacia Konferenco de la Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio, tio signifos, ke la ĝenerala aliro al la lingva problemo en la hodiaŭa mondo — tia, por kia pledas ankaŭ UEA — fariĝas ankaŭ la politiko de la tuta jugoslavia socio; tio plie signifas, ke en tiu lando la afero de la Internacia Lingvo ĝuos senrezervan apogon de ĉiuj sociaj, politikaj, ŝtataj kaj kulturaj forumoj, de la federacia ĝis la loka niveloj. Se tio okazos, kaj kiel diri por tio ne mankas bonaj aŭguroj, tiam la jugoslavia ekzemplo fariĝos imitinda en pluraj aliaj landoj, en kiuj la cirkonstancoj tion permesas.

S. M.

29-a Kongreso de TEJO en Sarajevo

En la jaro 1914 per atenca mortpafo eksplodis ŝargo, kiu siatempe amasiĝis en Eŭropo. Certe estis hazardo, ke Sarajevo devis esti elirpunkto de la Unua Mondmilito. Tamen, la "mesaĝo" de Sarajevo 1914 restos skribita per dikaj literoj en prihistoriaj libroj. 59 jarojn poste, denove mesaĝo venas de Sarajevo: Rezolucio de la 29a IJK de TEJO. Supozeble, ĝi ne atingos tian mondfamon kiel la iama mortpafo, sed tamen ĝi markos gravan etapon en la historio de TEJO. Provante daŭrigi la disdonon de epitetoj al niaj kongresoj, mi ĉijare elektus "publika". Ja, publika ĝi estis dank'al sindona fervoro de LKK, kiu jam anticipe cirkulere avertis la kongresanojn "esti seriozaj!"



La ĝisnunaj estraranoj de TEJO Renato Corsetti kaj Senad Ćolić interparolas kun eminentuloj de Bosnio kaj Hercegovino.

Problemo, kiu iom hontigis min kaj kiu tamen nur ĉijare en multaj kapoj plene konsciiĝis: Esperanto ne estas afero de la esperantistoj mem. Antaŭ ĉio ĝi devas esti afero de la vasta publiko, al kiu ni proponas nian solvon por la tutmonda lingva problemo. Malfermo de niaj rondoj tamen necesigas respekton al la kutimoj de la publiko kaj speciale de ties pintoj. Ne eblas postuli, ke ili adaptiĝu al la esperantista etoso. Afero — logika, sed tamen por multaj ne klara. Ĉeestis la inaŭguron en belega salonego de "Skenderija", kie antaŭ nelonge okazis mondĉampionado de tabloteniso, funkciuloj de la registaro de Bosnio kaj Hercegovino kaj de la urbo Sarajevo: Ĝemal Muminagić, vicprezidanto de la Respublika Parlamento, Mirko Pejnović, sekretario de la respublika junulara konferenco, Matko Topalović, membro de la prezidantaro de la Jugoslavia Junulara Ligo. Kvin oficialuloj salutvortumis la Kongreson. Ne temis nur pri sensignifaj afablaĵoj, sed oni aŭdis enhavoriĉajn frazojn pri la rolo de la junularo en la mondo por progreso kaj paco kaj pri la aktiva laboro de Jugoslavio por tiuj celoj. Same ni tre bone aŭdis (per lerta tradukarto de Osibov kaj Zadravec), ke la kvalito de TEJO kaj ties laboro estas alte aprezata. La Estraro de

TEJO sinsekve dankis la parolintojn. Jen gesto, kiu ne nur impresis sed ankaŭ elokvente montras la diplomatan lerton de la estraranoj. La vicprezidanto de TEJO, Tomas Jansson, dankis pro la afablaj vortoj de profesoro Popović, nova vicprezidanto de UEA kaj prezidanto de JEL, esprimante sian ĝojon pri la atento, kiun UEA dediĉas al la bonfarto de sia junulara sekcio, kaj ree substrekis la sincerecon de la deziroj de TEJO firme integriĝi en UEA surbaze de la mesaĝo de Toruń.

Same diplomatia, sed ne tiel serioze streĉa etoso regis en la akcepto ĉe la Alta Protektanto, prezidanto de la parlamento de Bosnio kaj Hercegovino, Hamdija Pozderac, kie oni povis vidi la estraranojn kaj kongresanojn en intima rondo, diskutantaj kun altaj sociaj agantoj de Jugoslavio.

Sekvoj de tia publika strategio estis ne nur kvinminuta intervjuo de Renato Corsetti en la ĉefa vespera televida novaĵelsendo kaj variaj gazetaj artikoloj, sed ankaŭ invito al oficiala interparolo kun reprezentantoj de la Jugoslavia Junulara Ligo. Tie estis naskitaj unuaj ideoj pri ebla kunlaboro sur kultura-lingva kampo.


Al la epiteto "publika" ĉiukaze kontribuis ankaŭ tuta aro da studvizitoj al uzinoj, sociaj instancoj, laborbrigadoj junularaj k.s. Tie la kongresanoj ne nur estis flatitaj per abundaj manĝaĵoj kaj donacoj, sed same okazis interesaj kaj profundaj diskutoj kun laboristoj kaj oficistoj, kiuj servis al pli bona ekkono de la jugoslavia popolo. Samloke eblis diskonigi la laboron de TEJO.

Certagrade la eksteren direktita agado de TEJO ĝenerale, kaj de la ĵus pasinta IJK speciale, bremsas internan stabiliĝon kaj la organizan laboron. Tamen: Kiom utilas stabilega, sed nekonata organizaĵo? Ŝajnas al mi, ke ĝuste nun ni troviĝas sur decida sojlo de nia agado: Unuflanke ni rikoltas fruktojn de nia longjara



La seriozaj mienoj pravas, ke en Sarajevo oni atente sekvis la kongresajn laborojn.

**La Solena Inaŭguro:
S-ro Ĝemal
Muminagiĉ, vic-
prezidanto de la
Respublika
Parlamento,
alparolas la
Kongreson**



agado (KER!), aliflanke ni ne kapablas formangi aŭ prepari ilin. Ŝajnas, ke tiu problemo estas unu el la kaŭzoj de la situacio en la Komitato: La komitat-kunsidoj kompare al pasintaj jaroj estis malpli viglaj (al tio certe kontribuis ankaŭ la varmega vetero). Krome, mi havis la impreson, ke la Komitato pli kaj pli ne plu konsciiĝas pri siaj demokratiaj rajtoj kaj devoj kaj tro senkritike obeas al la aŭtoritato de la Estraro. La grado de neinformiteco pri la organizaĵo ofte estas ŝoka.

Notinde restas el la priorganiza laboro: unuan fojon en la historio de TEJO ĉeestis prezidantoj de KolombEJO kaj de EJanZ, kio vekis nian atenton por la ekstereŭropaj landoj same kiel la aliĝpeto de novfondita junulara sekcio de Ĉilio. Ĝojige estas, ke tre verŝajne niaj okcidenteŭropaj sekcioj profitos financajn rimedojn el Eŭropa Junulara Fonduso kaj ke ankoraŭ ĉijare fondiĝos ĉeĥa TEJO-sekcio kun 500 membroj. Alvenis amaso da salutleteroj de plej divers-tendencaj NEJOj, okazis interparolo kun Socialista Unuiĝo de polaj studentoj pri kunlaboro. GEJ invitis la 30an IJK al Münster ("Junularo kaj edukado") kaj por la 31a IJK jam du invitoj venis: Karl-Marx-Stadt (GDR), kondiĉe ke UEA kongresos en Pollando, kaj Karlovo (Bulgarujo), se UEA kongresos en tiu lando. Estis elektita nova, ŝajne agema Estraro kaj ina prezidanto! Ĉar ankaŭ la ĝenerala sekretario kaj la kasisto estas inoj, al la du viraj vicprezidantoj restas grava respondeco gardi la seksan ekvilibron...

Certe, la atentema leganto intertempe miris, ke la kongresa temo ĉi tie ne tuŝiĝas. Tio ne signifas, ke la diskutoj pri la kongresa temo "Junularo kaj Hommedio" ne estis interesaj. Fakte restas, ke ĝi ne ludis tian rolon en la kompleksa kongresa programo, kiun ĝi meritis. Pli malpli neglektata de la kongresanoj, ĝi estis mucide pritraktata diverskvalite kaj diversrezulte. Tre agrable impresis la teknika preparo per presitaj enkondukoj al ĉiu subtemo. Sentiĝis tamen, ke eble la tasko estis tro granda por prilingva organizaĵo, kunigi komplikajn socian problemon kun siaj celoj. Renato Corsetti — intertempe Honora Prezidanto de TEJO — kelkfoje prave atentigis pri

la multflankaj aspektoj de la hommedio kaj akcentis la deziron okupiĝi pri la kultura, en tio ankaŭ lingva, karaktero de la medio kaj ties endanĝerigo per malobeo al la principo de samrajteco de ĉiuj nacioj kaj kulturoj. Finfine la Kongreso sukcesis akcepti rezolucion, kies enhavo respegulas bone kaj la seriozecon de niaj klopodoj kaj la komplikecon unuiĝi sur komuna platformo.

Ankoraŭfoje oni nete devas atentigi pri la danĝero de eksteraj rilatoj, kiam tiuj sen firma fundamento kaj koncepto evoluas. La tempo ŝajnas matura por pliprecizigi niajn starpunktojn kaj konkretigi la deklaron de Tyresö. Krome mi opinias, ke TEJO urĝe bezonas laborplanon por la tuta organizaĵo! Pri tio devus jam en la kuranta jaro okupiĝi la nova Estraro.

Sarajevo akceptis kun suno kaj adiaŭis nin pluve. Suno kiel unu el la trajtoj de la Kongreso simbolas la sukceson. Organiza flanko preskaŭ perfekta, ideal kongresejo, interesa kultura programo, kiu tamen ne lasis libertempon, kio ĝene malhelpis al libera babilado kaj flirtumo, — bona lingva nivelo, neniuj seriozaj malglataĵoj kaj amaso da novaj, freŝaj vizaĝoj, kiuj esperigas pri la vivanteco de nia organizaĵo.

Montriĝis, ke ĉiam pli malfacilas dum 7 tagoj kunpremi tiel ampleksan programon. Serioza partoprenanto de la Kongreso apenaŭ havis eblecon rigardi la urbon aŭ ripozi trankvile dum kelkaj horoj. En tio malhelpis ankaŭ la interesaj, sed tro longaj kaj sekve tute ne ripozigaj ekskursoj. Certe la venontaj LKK-oj devus reipensi la funkcion ĝuste de la ekskursita tago. Kaj la solvo ĉijara (longaj distancoj kaj plej diversaj celoj) kaj la solvoj pasintjaraj (dumekskursaj kunsidoj de komisionoj) ne estas oportunaj. Alternativo ŝajnas esti veturo al agrabla, trankvila, ne tro fora loko por tie ripozi.

Sarajevo por TEJO estis sukceso, kaj malfacilas en sekvaj jaroj ripeti tian kongreson. Dankon al niaj jugoslaviaj geamikoj, dankon al ĉiuj kontribuintoj en la Kongreso. Ek al la 30a Internacia Junulara Kongreso (!) en Münster!

Hans Eichhorn

Dokumentoj de Luksemburgo

En junio okazis unuafoje Esperanto-kongreso en Luksemburgo, kie havas sian sidejon pluraj institucioj de la Eŭropa Komunumaro. (Vidu en *Esperanto*, julio - aŭgusto, p.122.) Dum tiu kongreso la landaj Esperanto-asocioj de la landoj de E.K. ellaboris "konvencion" pri estonta kunlaboro. Pro la ekstreme grava lingva problemo en E.K. kaj la neceso de urĝa kaj celtrafa agado ĉe ĝiaj instancoj ni publikigas komplete ĉi tie la tekstojn de la kongresa rezolucio de Luksemburgo kiel ankaŭ de la aludita Konvencio.

REZOLUCIO

La 1-a EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO, okazinta de la 8a ĝis la 10a de junio de 1973 en Luksemburgo,

MEMORIGANTE la gravecon de la *Deklaracio pri la principoj de la internacia kultura kunlaborado* adoptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en sia dek-kvara sesio (1966), same kiel de la rezolucio 5,7 pri la eŭropa kunlaborado adoptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en sia dek-sesa sesio (1970),

MEMORIGANTE ANKAŬ la rekomendojn de la *Interregistara Konferenco pri la Kulturaj Politiko en Eŭropo* de la 19-28 junio 1972 en Helsinko, - kiu konferenco substrekas interalie la rolon de la kulturaj interŝanĝoj por *inspiri al la popolamasoj la rifuzon de internaciaj perfortaj agoj kaj de politikoj bazitaj sur la forto aŭ minaco per forto, sur la superregado kaj la agresemo*, kaj la valoron de la sindikataj organizoj, de la junulaj kaj virinaj grupigoj kaj de la aliaj internaciaj neregistaraj organizaĵoj por la estiĝo de *kultura demokratio*,

I. DEKLARAS, ke la tiucelaj prioritatoj estas jenaj:

- a) disvolvi por ĉiu homo la eblecojn de libera esprimado, komunikado kaj kreado,
- b) antaŭgardi la esprimilon de ĉiu regiona kaj nacia kulturo, kiel fonton de la internacia, kontraŭ la superregemo de nur kelkaj naciaj lingvoj kaj kulturoj,
- c) subteni la nunan formiĝon de internacia kulturo per la disvolvado de internacia komuna lingvo;

II. REKOMENDAS tiel al la ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Komunaĵo, kiel al Unesko,

- 1) ellabori kulturajn politikojn surbaze de la ĉi-supraj deklaritaj celoj,
- 2) ekkonscii, ke la Lingvo Internacia Esperanto estas la sola vivanta komuna lingvo, kapabla samtempe favori la esprimadon, komunikadon kaj kreadon de vere internacia kulturo kaj protekti la liberan disvolviĝon de la kulturaj apartaj valoroj kaj naciaj kaj regionaj,
- 3) konsekvence - kaj anstataŭ barakti en lingvaj prestiĝo-konfliktoj laŭ la antaŭdiro de Sir Winston Churchill: *La imperioj de la estonteco estos tiuj de la lingvo kaj spirito* - iniciati kaj apogi ĉion, kio akcelas la disvastiĝon de la Lingvo Internacia kiel rimedo de kulturaj interŝanĝoj kaj protektoj kaj kiel portilo de formiĝanta *monda kulturo*.

KONVENCIO

La 10-an de junio de 1973, en Luksemburgo, Esperanto-Asocioj de la landoj apartenantaj al la Komuna Merkato (E.E.K.), decidis kunordigi sian estontan agadon por la enkonduko de la L.I. Esperanto en la Eŭropajn Instituciojn.

Tiucele estas kreita "Eŭropa Esperanto-Centro por la landoj de la Komuna Merkato", kies gvidadon plenumos honorofica komitato konsistanta el unu direktoro, unu administranto kaj po unu reprezentanto nomita de la koncernaj Landaj Asocioj.

Komune estas konsentite pri jenaj antaŭvideblaj taskoj:

Por la Landaj Asocioj:

- Nomi kompetentajn personojn por reprezenti la Asocion kaj krei aŭ revivigi la L.A. - komitatojn por la eŭropa agado;
- Daŭre informi la parlamentanojn (minimume la membrojn de la Eŭropa Parlamento), kun la celo starigi parlamentan grupon;
- Krei specialajn kursojn por la oficistoj de la Eŭropaj Institucioj sur la teritorio de la L.A.;
- Publikigi en la asociaj revuoj ĉiujn informojn pri la Eŭropa agado kaj utiligi ĉiujn aŭdo-vidajn rimedojn por la disvastigo de tiuj informoj;
- Transsendi komunikojn al eŭropaj revuoj, aperantaj sur la teritorio de la L.A.

Por la Centro:

- Kunordigi la agadon en la "Eŭropa Movado";
- Kunordigi la agadon en la Eŭropa Instruista Asocio (A.E.D.E.);
- Kompili dokumentaron (Eŭropaj parlamentanoj — Elstaraj eŭropistoj favoraj al Esperanto — Listigo de la eŭropaj fakaj revuoj, k.t.p.);
- Zorgi pri kohera kunlaborado kun U.E.A., S.A.T., T.E.J.O. kaj koncernataj fakaj asocioj;
- Kunmeti informajn komunikojn;
- Instigi al kompilado de speciala terminaro pri administracio, diplomatio, ekonomio, juro kaj politiko;
- Instigi al traduko de eŭropaj traktatoj.

La financadon de la Centro liveros speciala "Eŭropa Fonduso", donace aŭ subvencie provizata.

Pri la vivo de la Centro ekskluzive kaj solidare kompetentas la asociiĝintaj Landaj Esperanto-Asocioj.

Kultura Turismo

Ateno, urbo de Sokrato, Platono kaj Demosteno, ĉefurbo de Greklando, lulilo de la eŭropa civilizo — apenaŭ povus troviĝi pli taŭga loko por la klopodoj de UEA akceli amasan kulturen turismon, laŭ la rekomendoj faritaj okaze de la Internacia Jaro de Turismo, konkludoj de la UK en Portland kaj la deziresprimoj de la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinki.

La Oficiala Postkongreso en Ateno okupis la semajnon post tiu de la UK en Beograd. Ĝi estis la unua aranĝaĵo de UEA en Greklando; partoprenis pli ol 200 postkongresanoj.

La Solena Inaŭguro okazis en la vespero de la 6a de aŭgusto, kun partopreno de reprezentanto de la Ministerio de Kulturo kaj Sciencoj kaj en ĉeesto de televidaj kameroj. Post diversaj bonvenigaj kaj salutaj paroladoj, brilan festparoladon faris la Prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna. En ĝi li komparis la formiĝon de la antikva greka *koinê* (komuna) lingvo kun la ekesto kaj evoluo de Esperanto, kiel ankaŭ la rolon de literaturo kaj parolarto por firmiĝo de la lingvo en ambaŭ kazoj. Poste sekvis vizito al la teatro de Dora Stratu, sur la deklivoj de la Akropolo, kie estis prezentita bunta programo de grekaj folkloraj dancoj.

La ĉefparto de la Postkongreso estis dediĉita, kiel menciite, al kultura turismo. Okazis kvar ekskursoj, plus unu eksterprograma. La unua kondukis al la Atika marbordo kaj Sunion, kie staras la templo de Pozidono — blua maro kaj blanka marmoro. La dua estis tuttaga aŭtobusa vizito al Argolando, kie pleje impresis la palaco de Agamemnono en Miceno (Mikino) kaj la trankvile impona templo kaj teatro de Epidaŭro (Epidavros). La tria estis rondveturo en Ateno, kun vizito al la Akropolo, kie eĉ la amasego turista ne povis forrabi la antikvan majeston de la Partenono kaj la aliaj temploj. Kvare la postkongresanaro krozis tuttage en la Saronika Golfo, kun vizitoj al la idilia insuleto Idra kaj al Egina. Laste okazis libervola ekskurso al Delfoj (Delfi), la sanktejo nestanta en la montoj, kun la orakolodona templo de Apolono, la stadiono, kaj la inspira fonto Kastalia. La programo estis kompletigita per du-tri prelegoj (inter kiuj prelego de d-ro Kotitsas pri la Helena Kulturcivilizo kaj lumbildprelego de prof. Shinoda), per Solena Akcepto fare de la Ministerio de Kulturo kaj Sciencoj, kun partopreno de neesperantistaj eminentuloj, kaj per adiaŭa bankedo kaj balo.

Ĉion igis eĉ pli agrabla la greka gastamo. Se okazis unu-du organizaj malglataĵoj — ĉefe dank'al la nesufiĉeco de lokaj esperantistoj kun adekvata lingvoscio — tion kompensis kaj pli ol kompensis la malavara afableco kaj sindonemo de la organizantoj, membroj de la invitinta Helena Esperanto-Asocio. Gratulon kaj dankon al ili!

J.C. Wells

Eta Mondo en Pionirski grad



En la plej bela parto de la ĉi-jara kongresurbo, Beograd, okazis la 13a Internacia Infankongreseto. Inter la arboj de plaĉa arbareto de Pionirski grad (Pionirurbo) dise staras belaj pavilonoj. En la pavilono de la Internacia Amikeco sin establis la ĉi-jaraj kongresetanoj. La kortan kaj la pavilonan enirejojn ornamis flagoj, insignoj, afiŝoj. Sur alta stango apud la vojo fiere flertis la esperanta standardo.

Post la partopreno en la Inaŭguro de la 58a Universala Kongreso, la kongresetanoj vivis sian apartan vivon en la Pionirurbo. Ĉiutagaj estis kantado, bano, naĝado, ludoj, kaj ankaŭ vizitoj de la gepatroj kaj aliaj amikoj de la Kongreseto. La estraro de la Pionirurbo atenteme zorgis pri bezonoj de la kongresetanoj. La estrino Bosiljka Pavlović, kiel bona patrino, ĉiutage mem inspektis la aranĝojn.

Ĵaŭdo, la 2a de aŭgusto, estis la Gepatra Tago. En la kinejo de la Pionirurbo okazis kulturaranĝo. La programo estis riĉa kaj plaĉa. La ĥoro kantis "Esperanto estas la lingvo por ni...", la amiko Kimo el Kopenhago ludis akordionon, aliaj kantis, aktoris kaj deklamis originalajn kaj tradukitajn kanzonojn, skeĉojn kaj recitaĵojn. La publiko varme aplaŭdis kaj ofte postulis reaperon de la partopreninto. Estis kelkaj veraj perloj de la programo, kiel ekzemple la dramigita "Espero" prezentita de la grupo el Split (Jugoslavio) kaj la ĉarma 4-jara hungaro Árpád No-gradi.

Por la kongresetanoj estis organizitaj prezentado de Disney-filmoj kaj de jugoslavaj filmoj, ŝakludado, ekskursoj kaj vizitoj al muzeoj, kaj fine, la 3-an de aŭgusto, okazis la Gaja Vespero.

La Kongreseton partoprenis 31 infanoj el naŭ landoj (Jugoslavio 8, Italujo 6, Britujo 5, Bulgarujo 3, Danlando 2, Hungarujo 2, Japanujo 2, Usono 2, Pollando 1). Sed en la atmosfero de la Kongreseto ekde la interkonatiĝo ili ne plu estis angloj, bulgaroj, japanoj, jugoslavo ktp., sed simple amikoj.


SVARMO da KUNSIDOJ

Kiam oni faras supraĵan trarigardon de ĉiuj eventoj, kiuj okazas en la kadro de niaj kongresoj, kiam oni ambicias, ke unu sola rigardo ampleksu ĉiujn aranĝojn dum la kongresa semajno, — pro la svarmo de kunvenoj, pro la bunteco de la temoj, pro la jam proverba bukado el plurdeko da nacioj, — onin kaptas emo rebapti la tutan aranĝon kaj nomi ĝin kermeso anstataŭ kongreso. Eble al tio ĉi pleje instigas la t.n. fakaj kunsidoj, kies hazarda foresto el la kongresaj programoj reduktus la scenaron je duona amplekso. Tamen, se niaj kongresoj ne enhavus la kunsidojn de diversaj kaj ĉiaspecaj fakoj, se en ili okazus nur komitataj kaj similaj kunvenoj, — ili certe perdus sian intereson kaj logus nekompareble malpli da kongresanoj. Nun, en tia kunveninundo, oni ĉiam povas trovi ion, per kio satiĝu la personaj inklinoj kaj preferoj.

Ankaŭ en Beograd tiu kermesa flanko de la Kongreso estis eventoriĉa. Se ni bone statistikis, entute okazis

38 diversaj fakaj kaj similaj aranĝoj dum la 58-a UK, kio certe estas granda nombro, des pli ke ĉio ĉi okazas pli-malpli nur en tri tagoj de la kongresa semajno. Kvankam estas riske pretendi pri kompetenta revuo de ĉiuj ĉi eventoj, ni provu almenaŭ mencii la plej gravajn el ili, tiujn, kies graveco estas iom ĝenerala kaj ne tro faka, lasante pli detalajn raportojn al la koncernaj fakaj periodaĵoj.

ILEI, la instruista fakorganizaĵo, kunvenis dufoje kaj priparolis, krom la aktualaj organizaj demandoj, ankaŭ la rezolucion de la ĵus okazinta konferenco en Maribor (inter la 21-a kaj 27-a de julio 1973), la kvinlandan eksperimenton pri la instruado de Esperanto en lernejoj kaj — eĉ perspektivan dekjaran laborplanon. *ISAE*-kunveno traktis jaran raporton pri la sciencista agado en 1972 kaj grandan tempon dediĉis al la problemaro de "Scienca Revuo", kiu nun aperas sesfoje jare kaj havas pli ol 600 abonantojn; oni planas eldonadon de unufakaj n-roj, kiuj



Jam estas tradicio, ke en la kadro de la Universalaj Kongresoj okazas ankaŭ la Internaciaj Kongresoj de Blindaj Esperantistoj. Tamen, por ke la blinduloj povu partopreni en la UK kaj tiel integriĝi en la tuta Esperanto-movado, la 41a Kongreso estis organizita antaŭ la Universala Kongreso. Ĝi okazis en Beograd de la 24a ĝis la 28a de julio 1973 en Studenta Domo.

La 25an okazis la Solena Malfermo de la Kongreso. Inaŭguris ĝin d-ro Aldo Grassini. La laborprezidanto V. Stefanović salutis la ĉeestantojn, substrekante la gravecon de Esperanto por la blinduloj. Sekvis salutparoloj de gastoj: d-ro Sadler (UEA), prof. Popović (JEL), reprezentantoj de neesperantistaj blindulaj organizaĵoj de Jugoslavio k.a. La Solena Malfermo finiĝis per raporto pri Blinduluniigo de Jugoslavio. La ĉeestantoj de la Kongreso sendis saluttelegramon al la Prezidanto de Jugoslavio Josip Broz Tito.

La postajn tagojn okazis laborkunsidoj de la Kongreso. Ampleksa raporto estos publikigita kiel aparta aldono de la blindula organo *Esperanta ligilo*, en kiu troviĝos ĉiuj referaĵoj en originala teksto kune kun la diskuto.

Dum la Kongreso estis prezentita ankaŭ raporto pri

la evoluo de la movado inter la blinduloj de Jugoslavio. La Kongreso instigis jugoslavojn elekti komitaton por la organizo de Ligo de Jugoslavaj Blindaj Esperantistoj.

La partoprenantoj havis ankaŭ ekskurson — ĉi-kongrese nur duontagan pro manko de tempo — al la Maŭzoleo de la dinastio de Karadjordjeviĉ, konstruita sur la monto Oplenac, apud Beograd. La streĉan laboron refreŝigis ankaŭ du altnivelaj distraj vesperoj. La franca familio Gonin prezentis sian artan programon el ŝercoj, recitaĵoj kaj kantoj kun akompano de gitaro. La Kulturarta Blindulsocieto de Beograd "Svetislav Andjelić", organizinto de la 41a Blindula Kongreso, donis koncerton de jugoslavaj popolkantoj kaj rondodancoj. Blindaj kantistoj kaj muzikantoj prezentis popolajn kantojn kaj muzikaĵojn el Serbio, Makedonio, Bosnio kaj Vojevodio kaj preskaŭ blindaj artistoj, familianoj kaj amikoj de blinduloj prezentis rondodancojn el Serbio kaj Vojevodio. Ankaŭ tiu ĉi programo estis altnivela kaj arte kvalita.

La 28an de julio venis la tempo por la Solena Fermo de la Kongreso. Anstataŭ formalaj rezolucioj estas rekomenditaj kelkaj valoraj proponoj kaj sugestoj koncerne la estontan laboron.



poste transformiĝus en memstarajn fakajn revuojn. Aparte kunvenis la *Matematika-Fizika Sekcio de ISAE* por trakti la principaron por la ellaboro de matematika kaj statistika terminaroj. *Filologoj* kunvenis sub la prezido de Atanas D. Atanasov kaj aŭdis prelegojn de prof. G. Sevak (Sovetunio) kaj D. Blanke (GDR) pri "La artefariteco de la naciaj lingvoj kaj planlingvoj". La medicinista organizaĵo, *UMEA*, kunvenigis 42 gekongresanojn, kiuj, interalie, diskutis proponon, ke oni premiu ĉiun membron de la Asocio, kiu eldonos iun sian fakan studon en la Internacia Lingvo; en la sama kunveno, la iama prezidanto de UMEA, d-ro H. Shinoda (Japanujo), elektigis kiel honora prezidanto de la medicinista fakorganizaĵo, *Agrikulturaj specialistoj, ILASE*, en la ĉeesto de 32 fakuloj, diskutis sian jaran raporton kaj la neceson, ke ĝiaj membroj klopodu plioftigi Esperantajn resumojn en agrikulturistaj periodaĵoj. *Juristoj* havis du kunvenojn, el kiuj la unua traktis administrajn demandojn de la organizaĵo, kaj la dua (publika) traktis la temon "Socia asekuro laŭ la juro de diversaj landoj", pri kio raportis reprezentantoj de 11 landoj. *IFEF*, la fervojista organizaĵo, kiu verŝajne estas la plej forta faka asocio en la movado, en sia kunveno aŭskultis prelegon pri "Integra transporto" de inĝ. L. Sekereš (Jugoslavio).

Pluraj fakaj kunvenoj estis ligitaj al diversaj agadoj kaj institucioj de UEA mem, kiel ekz. tiu de *Informaj Fakoj* de la Landaj Asocioj, kiun ĉeestis 23 personoj el 13 landoj, nombro, pri kiu oni rajtus plendi, konsiderante la gravecon de la informa agado. *Institucio Hodler '68* traktis sugestojn pri estontaj subvencioj kaj eblecojn pligrandigi la kapitalon de la fondaĵo. Kunvenis ankaŭ *reprezentantoj de la Landaj Asocioj*, kiuj reprezentigis en la Kongreso, kaj en aparta kunsido ankaŭ *UEA-membroj en Jugoslavio*. Al la kunveno de la *delegitoj de UEA* venis 170 personoj por trakti sugestojn pri plua plibonigo de la delegitaj servoj. Kunvenis ankaŭ *akademianoj, ĵurnalistoj, veteranoj, adeptoj de la Semajno de Internacia Amikeco*, ktp. *IPTEA*, asocio de poŝtistoj kaj telekomunikistoj, interalie traktis ankaŭ la preparojn por eldono de PTT-

terminaro. Simila problemaro, eldono de faka terminaro, enestis ankaŭ la tagordon de la kunveno de 50 *aŭtomobilistoj*. *Skoltoj* traktis la preparojn por la sekvanta ĵamboreo en Norvegujo (1975). La asocio "Monda Turismo" logis al sia kunveno ĉ. 150 kongresanojn, kiuj interalie elektis s-ron E. Carlén (Svedujo) prezidanto de la asocio.

Verŝajne la plej vigla faka kunveno de la Kongreso estis tiu, kiu okupiĝis pri la *Eŭropa agado*, t.e. pri la penetrado de Esperanto en la eŭropajn instituciojn kaj instancojn, aparte en tiujn de la Komuna Merkato. Sed, al tiu kunveno ni prefere revenu en unu el la postaj n-roj de nia revuo, kiam ĝian temaron eblos pli amplekse trakti. Iom tro vigle estis ankaŭ en la kunveno de *Mondpaca Esperantista Movado*, kie okazis nekultura incidento, pro kio oni pleje riproĉu la gvidantojn de tiu kunsido, kiuj ne sukcesis regi la situacion.

Restas ankoraŭ por mencii la kunvenoj de: ornitologoj, vegetaranoj, milit-rezistantoj, foto-, kino- kaj magnetofon-amatoroj, radio-amatoroj, membroj de Muzika Esperanto-Ligo, filatelistoj, kristanoj, katolikoj, bahaanoj, Oomotanoj kaj — ni certe ne sukcesis listigi ĉiujn fakajn kunvenojn, kiuj okazis dum la Kongreso.

Al la bunteco de la Kongreso kontribuis ankaŭ grupo da japanaj kongresaninoj, kiuj en aparta "faka kunsido" demonstris la japanan floranĝan arton. S-ro R. Dupuis logis plurajn centojn da kongresanoj al sia prelego "Festotago en Parizo", kiun li ilustris per lumbildoj kaj muziko.

Minimume 600 gekongresanoj partoprenis la eksterurbajn vojaĝojn dum la "ekskursa tago". Malgraŭ kelkaj plendoj, kiuj atingis ankaŭ nin, ne ŝajnas esti aparta aŭdaco aserti, ke la kongresanoj ĝuis la ekskursojn, kaptante tiel okazon konatiĝi kun io plia en la kongreslando, krom kun Beograd aŭ sole kun la kongresejo kaj sia hotelĉambro. La vesperon post la ekskursoj, estis prezentitaj kvin mallongaj filmoj: "Aŭstralio", "Renkonto kun FIAT", "Sekureco daŭras", "Malpli ol mil" kaj "Lastaj Ceramikistoj". Malgraŭ kelkaj teknikaj malglataĵoj, plejmulto trovis ankaŭ la filmojn ĝuindaj.

1638 personoj el 42 landoj partoprenis la 58an UK en Beograd. Plej amase ĉeestis francoj, italoj, usonanoj, japanoj kaj jugoslavo.

Fotis: Davor Grgat





MIĤALSKI, Eŭgeno (1897–1937)

Originale verkita por Enciklopedio de Esperanto de
CLELIA CONTERNO GUGLIELMINETTI

Jam plurfoje ni publikigis artikolojn verkitajn por la nova eldono de la Enciklopedio de Esperanto, preparata de la eldonejo J. Régulo sub aŭspicio de CED kaj redakto de Ulrich Lins kaj Reinhard Haupenthal. Ĉi-foje ni elektis la artikolon pri E. Miĥalski, unu el la plej elstaraj kaj influrikaj figuroj en la originala poezio de Esperanto el la periodo intermilita.

Ruso; naskiĝis la 21an de januaro 1897 en Letiĉev (Ukrajno); loĝis en Ukraino, antaŭe en Voznesensk, pli poste en Stalino, Donbass; profesie instruisto kaj bibliotekisto. Malaperis en 1937 dum la persekutado kontraŭ la sovetaj esperantistoj, supozeble en koncentrejo. Esperantisto de 1911, li kunlaboris al pluraj gazetoj: *Literatura mondo* (Budapest 1922-26), *La nova epoko* (literatur-socia, Moskvo 1922-23, kaj Paris ekde 1928), *Sennacieca revuo* (SAT, Leipzig 1923-28), kaj al aliaj socialismaj gazetoj: *Internacisto*, *La nova etapo*, *Sur posteno*, *Torĉo de l'edukisto*, *Popola fronto*; fondis mem gazeton, *Libera Torento* (Saratov, 1917-18); fondis kaj gvidis Internacian Asocion de Revoluciaj Esperanto-verkistoj (IAREV, 1931-37).

Li publikigis poemojn: *La unua ondo*, kune kun Polakov, (Saratov 1918), *Du poemoj* (Moskvo 1922), *Prologo* (Leipzig 1929), *Fajro kuracas* (Leipzig 1932), *Kantoj de l'amo kaj sopiro* (Varsovio 1934); *Reforĝo de l'homo*, longa poemo (verkita 1933-34, nur fragmente presita). Li ankaŭ multe laboris kiel tradukisto el Puŝkin, Gogol (*La terura venĝo*), Tolstoj (*Milito kaj paco*), Ostrovskij, Ŝoloĥov kaj aliaj el la sovetaj literaturo. Lia *Teorio de Esperanta tradukado* ne aperis prese: en 1937 Miĥalski "tragedie mortis" (laŭ Ŝtejnberg) — evidente kiel viktimo de la aresta ondo kontraŭ la esperantistoj en Sovetunio.

La nepovon priploritan de Hohlov, eluzi la eblecojn de nia lingvo por nudigi kaj traserĉi la motivojn de la rusa animo, Miĥalski provis superi, en sia impeto, en sia "delir' poezia", fleksante la lingvon mem ĝis la lasta ebleco, luktante por sin esprimi ĝis ellaso de mortnaskitaj vortoj kaj eldiroj. Malgraŭ tiu konstanta baraktado, aŭ pli bone tra ĝi, li volas ĝui kaj ĝuigi al la leganto la venkon kontraŭ la banalo, la superadon de la ĉiutageco, kaj ĵeti sin, tra nesonditaj spacoj, al la Nefinito, ebria je suno kaj lazuro. Lia tuta poezio estas kontrasto inter kosma dimensio kaj homa. Eĉ kiam li kantas sensan amon en "densa maro de banalo" li penas liberiĝi, ne el la volupto, kiun li plenplene envivas, sed el la ŝablono, por iĝi jen amanto de la "virgino de l'arĝenta astro", jen pastro de "L'eterna Spirito". Sed lian febran revon, prematan de superstiĉoj kaj mitoj, el kiuj li strebas liberiĝi, rompas ofta motivo, la sireno de aŭto aŭ la bruo de tramvagono: abrupta sintrudo de la realo en atmosferon artefare rafinitan.

Same kontrastas en li malnovaj antaŭjuĝoj kun novaj idealoj, kaj sentema animo kun al ĝi trudataj temoj,

kiel Auld rimarkis: Miĥalski ofte malaperis kiel poeto kiam li devis, aŭ volis, propagandi anstataŭ interpreti.

Tiaj evidentaj kontrastoj en la tuta verkaro de Miĥalski, kaj ties "perdiĝo inter la kontrastoj" (Nekrasov), naskis diskutojn inter la recenzistoj kaj kritikistoj, kiuj daŭris eĉ post lia morto, forte nuancitaj laŭ la personaj sociaj konvinkoj de la analizantoj.

Ni serĉus preskaŭ senrezulte en lia abunda produktado inter la du mondmilitoj, laŭlonge de liaj poemoj (eĉ en *Prologo*, la plej karakteriza, kie plej akre sentiĝas la kunpuŝiĝo de la efektivo kun anghela strebado al iu superrealo mondo), la "grekan harmonion" de Hohlov, la ondon milde sonorante de la liriko; ankaŭ la amo estas ia ekstazo en materia sfero, sur kies limoj baraktas la liberiĝema impeto de Miĥalski.

Bibliografio

D. Kralj, "Kvar prelegoj pri la Esperanta literaturo", Ljubljana 1960, p. 64-70.

W. Auld (red.), "Esperanta Antologio", La Laguna 1958, p. 224-243, 614.

N.V. Nekrasov, Artistoj de verso. Kritika skizo pri N. Hohlov kaj E. Miĥalski, en "La nova epoko", vol. 6/10, 1928/29, n-ro 11, p. 316-320.

Ĵief, Eugen Miĥalski, Prologo, en "Sennaciulo", vol. 5, 1928/29, n-ro 245, p. 367.

E. Miĥalski, Prologanta epilogo de l'individueco. Provo de l'aŭtokritiko komenta, en "La nova epoko", vol. 7/11, 1929/30, n-ro 8, p. 233-239.

N. Ŝtejnberg, Eŭgeno Miĥalski, en "Nuntempa Bulgario", 1968, n-ro 6, p. 44-45.

C. Conterno, Eugen Miĥalski, en "Literatura foiro", 1971, februaro, p. 17-18.

Recenzas William Auld (Skotlando):

Drole kaj petole, de Giorgio Silfer. Milano: "La Patrolo", 1972. 18p. 24cm.

Konstatinte, ke mankas taŭgaj viglaj mallongaj legaĵoj por junaj lernantoj, Giorgio Silfer mem ekverkis kelkajn, kaj en tiu ĉi maldika volumeto prezentas dekon da ili. Ili varias de amuzaj anekdotoj ĝis facilaj filozofiaĵoj. Kelkaj estas ligitaj al la vivo esperantista, aliaj al la travivaĵoj de (supozeble) la aŭtoro. La verko plenumas sian celon, kaj amuzos, eĉ se mallonge, ankaŭ spertulojn.

Mendu ĉe UEA: 3,— (por Nederlando 3,12) gld. plus sendokostoj 10%.



RECENZOJ

LEGOMATERIALO POR KOMENCANTOJ

Recenzas d-ro Vilho Setälä (Finnlando):

Savo el la neĝo, de P. Korte. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1973. 77p. Ilus. 20 cm.

La romaneto celas forigi la mankon de facila kaj interesa legomaterialo por geknaboj ĵus finintaj elementan kurson. La verketo estas konforma al la celo: Vortuzo kaj stilo estas adaptitaj al la lingvoscio de junaj studentoj. De tia verko oni kompreneble atendas plej seneraran lingvon. Pro tio ni kuraĝas atentigi pri kelkaj negravaĵoj. "Post la enterigo de lia patrino li iris al najbaroj". Devus esti "sia patrino", li ja enterigis sian patrinon kaj ne tiun de aliulo. — "Li ne plu vidas du malgrandajn figurojn" devas esti "la du m. figurojn", ĉar temas pri tute difinitaj figuroj, tiuj de liaj "geonkloj". — Kelkfoje ŝajnas esti uzata "se"-frazo anstataŭ dezira: "Se oni nur ne atendu tro longe." anst. ekz. "La atendo nur ne estu tro longa". — Pli da zorgo pri rekteco de linio ĉe enmeto de korektoj estus dezirinda. Cetere: tute rekomendinda verketo.

Mendu ĉe UEA: 4, 08 (por Nederlando 4, 24) gld. plus sendokosto 10%.

SUR BRETON DE KATOLIKO

Recenzas Stefan Maul (F.R. Germanujo):

Dokumentoj el Romo: 8-11. Tradukis H. Roosen S.C.J. kaj H.G. Wannemakers S.J. Tilburg: Internacia Katolika Informejo, 1972. 44p. 19, 5 cm.

La plej "aktuala" parto en ĉi tiu kolekto de "dokumentoj el Romo" estas "la protekto de la vivo", mallonga letero de Paŭlo VI pri la nun vigle diskutataj temoj aborto kaj eŭtanazio. Krome la broŝureto enhavas bibliografion de oficialaj katolikaj dokumentoj en Esperanto de 1920 ĝis 1971.

El la du enciklikoj la unua, *Humanae vitae*, havas preskaŭ nur historian valoron, ĉar la nuntempa teologio kvazaŭ ignoras ĝin. La dua, encikliko pri la eŭkaristio, estas interesa por ekumene interesitaj esperantistoj.

Mendu ĉe UEA: 2,70 (por Nederlando 2,81) gld. plus sendokosto 10%.

LERTE PLEKTITA ROMANO

Recenzas William Auld (Skotlando):

Mr. Tot aĉetas mil okulojn, de Jean Forge. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1973. 243p. 18cm. ISBN 951-9005-29-3

Dum mankegas al ni nova generacio de romanverkistoj ni turnu nin dankeme al tiuj, kiuj pli frue regalis nin per siaj verkoj. Inter ili elstaras ankaŭ Jean Forge, kaj el liaj verkoj elstaras *Mr. Tot*. Ĝi estas romano arte senpretenda, kies sola celo estas distri kaj amuzi — oni povus nomi ĝin eĉ sensacia — kaj tiun celon, laŭ mia gusto, ĝi abunde plenumas. Kvankam iasence ĝi plene apartenas al sia epoko (la tridekaj jaroj), preskaŭ certe ĝi plaĉos ankaŭ al la hodiaŭuloj.

Temas pri riĉegulo vivtedita, kiu, laŭ propono de la mistera d-ro Kivikas, aĉetas hotelegon kaj instalas siajn "mil okulojn" (televizorojn), per kiuj li povas spioni la agadon de la gastoj. D-ro Kivikas havas proprajn motivojn por tiu propono... Lerte plektita estas la intrigo de la romano, kaj lertege ĝi disvolviĝas pere de amaso da roluloj, kiuj inkluzivas ekz-e komikan detektivon, senkoran vetludiston, belan krimulinon, naivan stenotipistinon, dancistinojn, ampetatan hotelbubon, k.m.a. Forge estis sukcesa filmreĝisoro, kaj tio montriĝas en la verko, kies multaj lertaj scenoj certe estus facile surekranigeblaj, kaj kies rolantoj estus volonte realigataj de spertaj filmaktoroj.

Kiel trafe konstatis siatempe Tárkony, "Ĉe Forge ĉio estas en movo, ne nur la okazintaĵoj, sed ankaŭ la animoj de liaj herooj. Ili vivas en ia pliintensigita, plistreĉita stato, kiu preskaŭ similas al ebrio". Tio estas vera, kaj tiu streĉiteco multe kontribuas al la atentokroĉeco de la rakonto.

La stilon de Forge Tárkony karakterizis jene: "Facila, vigla, rulanta Esperanto", kaj ankaŭ pri tio li pravis. Kvankam harfendemuloj trovis ie-tie etan malglatiĝon, aŭ eĉ eraron (ĉambro plenplena *da* homoj), tamen malgraŭ tio oni ne povas tro rekomendi la *stilon* de Forge kiel imitindan modelon de flua, vigla, vere vivanta, ĉiel esprimiva lingvaĵo. Kiu, kiel mi, tediĝis pro la tro ofte peza, senviva, artefariteca stilo de multaj nuntempuloj, tiu turnu sin frandeme al *Mr. Tot*.

Mendu ĉe UEA: 12,— (por Nederlando 12,48) gld. plus sendokosto 10%.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan bel-etraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankan-
tan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokosto 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

EL ITALUJO

Recenzas William Auld (Skotlando):

Karnavalo, de Lina Gabrielli. Roma: Kleszczynski, 1973. 77p. 21cm.

Jen vere alloga kolekto de originalaj rakontoj. Ĝis kioma grado ili spegulas la vivon de la aŭtorino, ĝis kioma grado ŝian fantazion, mi ne scias, kaj tio verdire ne gravas. Sed ili odoras je la realeco, la spirito

precipe de la juneco. Ili efektive kaptas la etoson de la junaĝo. Jen gaja, naiva lamulino karnavalas senhonte sed ankaŭ senpeke: tute klare la maskiteco, la karnavaleco, liberigas animon tro strikte edukitan. Jen (en "Solulino", laŭ mia gusto la plej perfekta juvelo en la kolekto), deknaŭjara junulino pro sia senzorgemo pasigas nokton, sendomaĝe, en milita barako; ĉiu, kiu faris similajn stultaĵojn en simila aĝo rekonos la aŭtentikon de la etoso. Jen du amrakontoj, kiuj spiras realecon, estas delikat-alude konturitaj al ni. Jen fine la sola aperte trista historio: la mal-espero de serioza amperdo. Ĉiu, kiu aprecas legaĵon luman kiel akvarelo, kaj ne postulas sensaciojn, altetaksos, kiel mi, la talenton de ĉi aŭtorino.

Mendu ĉe UEA: 7,20 (por Nederlando 7,49) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis

A/II/1: El problema lingüístico en las relaciones internacionales I. Lapenna. Tradukis A. Tur Thomas (1972). 8p. 29cm. Broŝ. 2,16 gld.

Abismoj (1923, fotorepreso 1973). J. Forge. 150p. 18cm. Broŝ. 6,96 gld. (Serio Forge, 1). Amromano kun frapante klara stilo kaj populare profunda psikologio.

Anatomio de la homa korpo (1972) T. Nakayama. 52p. Mimeo. 29cm. Broŝ. 15,— gld. Kursoteksto de Someraĵ Universitataj Kursoj 1972.

A nemzetközi nyelv (La internacia lingvo) (1972). Á. Rátkai. 69p. 22cm. Broŝ. 1,20 gld. Hungarlingva libreto pri la evoluo de la laborista esperanto-movado inter 1905 kaj 1914.

Arbo de la sciado, La (1911) P. Baroja (1872-1956). El la hispana tradukis F. de Diego (1972). 231p. 23cm. Broŝ. 11,40 gld. (Belliteratura serio, 31). Filozofia romano, laŭ la eldonisto "unu el la plej allogaj verkoj de la romanisto".

Bonhumora Injektilo (1973). Ergoto de Bonaero. 192p. Ksero. 18cm. 12,72 gld. Kolekto da spritaj dialogoj kaj amuzaj anekdotoj.

Ĉu interkonsento en la meza oriento? : Voĉoj por kaj kontraŭ Israelo (1968). T. Bijlsma, H. van Praag, M. Suudi. El la nederlanda tradukis W.A. Verloren van Themaat (1973). 61p. Ksero. 21cm. Ringe broŝ. 5,46 gld.

Doktoro Rosales (1973). G. Silber. 24p. Ofs. 25cm. Broŝ. 3,30 gld. Originala dramo.

Esperanto-ABC, het; la fundamenta prononco de Esperanto (1973). T. Hugiimoto. Disko unuflanka, monofona, fleksebla. 33t/m. 18cm. 1,26 gld. Kovrilo kun nederlandlingvaj klarigoj. La disko mem estas tute en Esperanto.

Espéranto, L' (1973) P. Janton. 126p. 18cm. Broŝ. 4,14 gld. (Serio Que Sais-Je?, 1511). Franclingva historio de Esperanto kaj esperantismo, kun teknikaj analizoj de la lingvostukturo aparte interesaj por lingvostudentoj kaj instruistoj.

Esploroj (1973) B. Ragnarsson (1930-). 122p. 19cm. Broŝ. 6,60 gld. (Beletraj kajeroj, 44). Poemaro originala.

Eszperantó szakpróba (1973). B. Hegedüs. 103p. Ilus. 19cm. Broŝ. 1,74 gld. Lernolibro por la Pionira movado.

Girlando da Sonetoj (1833). France Prešern (1800-1849). El la slovena tradukis J. Velebit (1973). 43p. Ofs. 22cm. Broŝ. 3,96 gld.

... kun siaspeca spico! (1971) R. Schwartz (1894-1973). 215p. 23cm. Broŝ. 10,50 gld. (Belliteratura serio, 29). Antologio el la humuraĵoj de Schwartz, represitaj ĉefe el diversaj revuoj; interalie troviĝas la tuta serio de *Laŭ mia ... ridpunkto*.

La verda raketo (1961, fotorepreso 1973). J. Forge. 145p. Ofs. 18cm. Broŝ. 7,02 gld. (Serio Forge, 4). Noveletaro.

Lerta leganto Kvin numeroj, entute 52p. Kolorilus. 21cm. Por unu kompleto 2,70 gld. Gazeto por infanoj kaj komencantoj. En la unua estas kelkaj anglalingvaj klarigoj.

Mr. Tot aĉetas mil okulojn (1931, fotorepreso 1973). J. Forge. 242p. Ofs. 18cm. Broŝ. 12,— gld. (Serio Forge 3). Detektiv-romano.

Vojo kaj vorto (1972) R.P. Nogueira (1949-). 110p. Broŝ. 6,60 gld. (Beletraj kajeroj, 41). 17 originalaj poemoj kaj tradukoj el 18 diverslandaj modernaj aŭtoroj.

Ni kaj ĝi (1972) G. Waringhien (1901-). 344p. 23cm. Broŝ. 15,60 gld. (Belliteratura serio, 30). Ĉi tiu tria granda volumo de la eseoj de Waringhien prezentas temojn religiajn kaj artajn.

Paĉugo kaj Paĉuga M. Tiranti. El la ĝenova dialekto de la itala tradukis G.B. Briano (1973). 13p. Mimeo. 33cm. Broŝ. 1,92 gld. Radia komedieto.

Perfektiga kurso; plena traktato pri la sintakso (dua eld., 1973). D. Quarello. 191p. 22cm. Broŝ. 18,36 gld.

Popido; la verda dialekto (1973). M. Halvelik. 54p. Ilus. 29cm. Broŝ. 17,22 gld. (Normlingva serio, 5) Dialektaj prozaĵoj el kvin lingvoj tradukitaj laŭ klarigita metodo.

Terminaro por bibliaj studoj (1973). George Rust, red. Donald Broadribb. 79p. 24cm. 5,88 gld. Terminaro celanta servi al i.a. la komitato preparanta novan tradukon de la Biblio. Pretigis antaŭ sia morto en 1970 George Rust; redaktis laŭ liaj deziroj Donald Broadribb.


Tornistro, La; por instruoj kaj por distro (1973) Redaktis Ergoto de Bonaero. 48p. Ilus. Ksero. 21cm. 5,— gld. Tradukoj, recenzoj kaj artikoloj, seriozaj kaj amuzaj, novaj kaj represitaj.

Trompeter, Wilhelm Heinrich (dua eld., 1973). A. Holzhaus. 152p. Ofs. 22cm. Broŝ. 9,30 gld. Biografio de pionira esperantisto per represaĵo de liaj leteroj kaj presitaĵoj, kun komentarioj.

Unuaj libroj por esperantistoj (1887, 1888) D-ro Esperanto (L. L. Zamenhof). 156p. 22cm. Bind. 18,— gld. (Kompletaj verkoj de Zamenhof, 1). Fotorepreso de la originalo, kun postparolo de membroj de la provizora eldonkomitato, kaj historiaj notoj kaj komentoj.

Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto (1973). A. Holzhaus. 317p. 25cm. Bind. 17,70 gld. Dulingva kolekto de poemoj kaj prozaĵoj de Heine, kun Esperanto-tradukoj prenitaj el Esperanto-gazetoj de post 1889.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.



NEKROLOGOJ

FRIEDRICH HELFERS (1900-1973)

En Karlsruhe, FR Germanujo, mortis la 15an de septembro 1973 s-ro Friedrich Helfers, membro de UEA dum pli ol 50 jaroj kaj delegito kaj fakdelegito en Karlsruhe. Li servis kiel Ĉefdelegito de UEA por FR Germanujo de 1952 ĝis 1963, kiam li devis transdoni la laboron pro okulmalsano. En tiu ofico li helpis multajn personojn en la postmilita periodo.

NIKOLAJ RYTJKOV (1913-1973)

La 1an de septembro 1973, en Londono, pro stomaka kancero mortis Nikolaj Rytjkov, Esperanta aktoro kaj anoncisto ĉe BBC.

Naskiĝinta la 3an de decembro 1913 en Smolensk, Ruslando, N. Rytjkov eklernis tie Esperanton en la jaro 1926 ĉe Roman Nikoljskij. Aktoriĝinte ĉe la Akademio de Drama Arto "A. Lunaĉarskij" li estis aktoro de la Teatro Lenin-Komsomol en Moskvo ekde la jaro 1933. Kiel aktiva membro de Sovetrespublikara Esperantista Unio, deklarita en la jaro 1938 spiona organizaĵo, li estis arestita kaj ekzilita al Siberio. Ekde 1956, plene senkulpigita kaj liberigita, li reaktoris en la Teatro Lenin-Komsomol kaj rolis en filmoj kaj ĉe la radio kaj televido en Sovetunio. Kiel kunaŭtoro li partoprenis en la preparado de la Rusa-Esperanta Vortaro de E. Bokarev. Ofte li deklamis dum kunvenoj de Moskvaj esperantistoj, antaŭ kiuj li unuafoje realigis sian revon: ludi la rolon de Lenin.

En 1963 N. Rytjkov debutis antaŭ la internacia Esperanto-publiko dum la 48a Universala Kongreso en Sofio. Ekde la jaro 1965 li ofte recitadis en la Esperanto-Kongresoj en Eŭropo, lastfoje en la 56a Universala Kongreso en Londono. Dum la lastaj jaroj li ludis la rolon de Lenin sur la profesia scenejo ĉe la Okcidentgermana Televido en la telefilmo "Bürgerkrieg in Russland" ("Intercivitana milito en Ruslando") kaj en la teatraĵo "Magnificence" ("Gloro") en Royal Court Theatre en Londono. BBC elsendis liajn deklamojn el "En la Unua Rondo" kaj "Kancera Hospitalo" de Solĵenicin en la rusa kaj Esperanto, en kiun li mem tradukis la fragmentojn.

Li estis okupita pri produktado de radio-kurso pri Esperanto por elsendado el universitataj radio-stacioj, kiam la morto ĉesigis lian agadon.

MAURICE BOURGEOIS

Forpasis la 15an de junio 1973, en Tananarive, Malagasa Respubliko, s-ro Maurice Bourgeois, 81-jara. Li estis delegito de UEA en Tananarive de 1939 ĝis la morto.

LAŬRO GABALDA

La 2an de julio 1973 mortis en Hispanujo pro aŭtomobilakcidento Laŭro Gabalda, 24-jara, el Francujo, fianĉo de f-ino Demmendaal en Rotterdam. La fianĉino povis ekscii pri la tragedio nur post tri semajnoj, dank' al esploroj de hispanaj membroj de UEA, ĉar post la akcidento la aŭto forbrulis neidentigeble.

Komuniko de Internacia Esperanto- Instituto

En la tridekaj jaroj fondiĝis en Hago Internacia Esperanto-Instituto. Sub gvidado de la famkonataj s-ino Isbrücker kaj s-ro Cseh la instituto floris. La instrumentado de s-ro Cseh vekis ondon da entuziasmo. La leginda libro *La Internacia Lingvo*, eldono de U.E.A., diras pri ĝi: "La ĉefa karakterizilo de la Cseh-metodo estas, diference de la metodo Berlitz, senigo de lernolibroj. Estas akcentinde, ke la lernanto laŭ tiu metodo tre baldaŭ ekparolas en la Internacia Lingvo"

Dum multaj jaroj s-ino Isbrücker kaj s-ro Cseh eldonis la revuon *La Praktiko*, nomatan "la gazeto, kiu instruas kaj amuzas".

Sed s-ino Isbrücker mortis. S-ro Cseh ne akceptis helpon kaj dum longa tempo klopodis tutsole estri la laboron sed pro siaj aĝo kaj malsaniĝo ne sukcesis en tio. La gazeto ne plu aperas, kaj la aferoj de la Instituto malordiĝis.

Nun aliaj estraranoj decidis reordigi kaj revigligi la Instituton. S-ro Cseh ne plu estas direktoro kaj ne plu loĝas en la oficejo de la Instituto.

La adreso de la Instituto restas la sama: Riouwstraat 172, Hago, Nederlando; telefonoj: 070-556677 kaj 070-669353.

Ekde nun la libroservo kaj aliaj okupoj denove funkcias normale. Eble multaj esperantistoj havas motivon por plendi pri la Instituto pro tio, ke ili ne ricevis respondon al letero. Tion ni ne povos ripari; s-ro Cseh kunprenis centojn da leteroj kun la laŭdinda intenco respondi ilin. Ni estas konvinkitaj, ke li certe ne kapablos fari tion, do, ni petas pardoni lin.

Sed povas esti io pli grava: ekz. fakturoj nepagitaj, mendoj neplenumitaj, aŭ aliaj sufiĉe gravaj faktoj, kiuj malserenigas vian agrablan memoron pri la Instituto. Tiukaze ni petas vin informi nin pri tio, kaj ni klopodos fari ĉion eblan por kontentigi vin. Ankaŭ la kontraŭo estas ebla: ekz. ke vi ankoraŭ ŝuldas ion al la Instituto. Eble vi ricevis sendaĵojn sen fakturo aŭ enkasigis monon por liveraĵoj, kiuj ankoraŭ ne estas reguligitaj?

Se vi informus nin pri tio, ni vere ĝojus. Cetere ni petas vin, konservi en honoro la memoron pri la mortinta s-ino Isbrücker kaj pri la vivanta s-ro Cseh, tiuj grandaj pioniroj, kiuj multe faris por la Esperanto-Movado!

En la nomo de la estraro de
Internacia Esperanto-Instituto
J. H. Vink

LOKE — FAKE — PERSONE

FAKE

Literaturo

- La ĉina bildrakonto *Mi volis viziti lernejon*, eldonita en Esperanto de Ĉina Esperanto-Ligo en 1959, ĵus aperis en Milano en germana traduko farita el la Esperanta teksto. Jam pli frue aperis samloke itala eldono, ankaŭ ĝi tradukita pere de Esperanto. Temas pri la tria pontotraduko el la ĉina lingvo farita pere de Esperanto.
- La Fremdlingva Eldonejo en Hanojo anoncis, ke ekde 1974 aperos en Esperanto *Antologio de la vjetnama literaturo*, ekde ĝiaj originoj ĝis niaj tagoj. La Antologio konsistos el pluraj volumoj, el kiuj la unua ampleksos la periodon de la 10a ĝis la 19a jarcento.
- Baldaŭ aperos longedaŭra gramofondisko de la plej bonaj eroj el la deklam-repertuaro de la ĵus forpasinta Nikolaj Rytjkov. (Vidu nekrologon sur la paĝo 173.) Redaktas Reto Rossetti. Detaloj sekvos.

Lernejoj

- En la ĵurnalo *Los Angeles Times* (eldonnumero unu miliono) la monde konata lingvisto Mario Pei artikolis lastatempe pri la kriza malkresko de la lernado de fremdaj lingvoj en Usono. Interalie li proponas la instruadon de Esperanto kiel bazon por eventuala plua lingvo-studo, samtempe atentigante, ke ĝi mem estas utila komunikilo en multaj landoj de la mondo.

**S-ro Hussain
Mohammed Al-Amily,
D de UEA en Bagdad,
prelegis pri la
Internacia Lingvo por
ĉ. 30 libanaj
instruistoj el eduka
seminario en Sukul
Garb, organizita de la
Ministerio de Edukado
en Libano.**



Turismo

- Aperis nova varbilo sub la titolo "Moderna turismo pli facile per Esperanto la internacia lingvo", kun teksto en 14 lingvoj eŭropaj kaj inform-adresoj en 24 eŭropaj landoj. La varbiloj, dukolore presitaj, estas senkoste riceveblaj ĉe la eldoninto, Hermann Behrmann, D-4972 Löhne 1, FR Germanujo.
- Sub la titolo "Esperantista Amikeca Itinero", dudeko da lokaj Esperanto-grupoj en Ĉeĥoslovakujo, Germana DR kaj Pollando kun entute ĉirkaŭ mil membroj organizis reton de membroj, kiuj pretas je malalta prezo disponigi ĉambron en sia loĝejo al vojaĝantoj. Bultenon kun adreslisto publikigis la Turisma Komisiono de la Vojevodio Estraro de Pola Esperanto-Asocio, P.K. 16, PL 50-952 Wrocław 17.

Sporto

- Partoprenantoj de la 17a Esperantista Skirestado en Adelboden (Svislando), de la 26a de decembro ĝis la 5a de januaro, povos eklerni aŭ perfektigi la skiarton en internaci(lingv)a medio. Informas: Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314 La Sagne, Svislando.



Esperanta stando en la Internacia Specimen-Fairo de Bilbao ĉi-somere. La sukceso de la stando sekvigis organizon de Esperanto-kurso por interesiĝintoj.

Rotario

- La brita rotaria organizaĵo antaŭnelonge akceptis rezolucion, per kiu ĝi petas la Estraron de Rotaria Internacio nove pristudi la lingvan problemon kaj precipe la valoron de Esperanto.

PERSONE

Starke

- Raran jubileon (aparte por nia epoko!), Diamantan Geedziĝon, festis la 20an de septembro 1973 gesinjoroj Camilla Starke-Overbeck kaj Alexander Starke, FD pri teatro en Nurenbergo. Samtempe, ĉi-jare, venas ankoraŭ unu jubileo ligita kun la agado de s-ro Starke: Antaŭ 50 jaroj, laŭ lia instigo kiel aktoro de la Urba Teatro, liaj gekolegoj lernis Esperanton por ludi antaŭ la kongresanoj de la 15a UK en Nurenbergo la teatraĵon "Natan la Saĝulo", kiu ĝuis grandan sukceson ĉe la internacia publiko. La fakto ege mirigis la aktorojn, kiuj timis ne esti komprenitaj en la ĵus lernita lingvo.

Haazen

- La antverpena Esperanto-aktivulo Jo Haazen, internacie konata ankaŭ kiel plurfoje premiita kariljonisto, faris unuan koncertvojaĝon tra Usono inter la 21a de junio kaj 14a de julio. La gazetraportoj, priskribante lian elstaran muzikan karieron, preskaŭ senescepte akcentis ankaŭ lian uzon de la Internacia Lingvo.

LA PREZIDANTO DE Israelo, fama kemiisto prof. d-ro Efraim Kacir akceptis antaŭ nelonge delegacion de Esperanto-Ligo en Israelo. Dum la akcepto estraranino de JELI Tikva Ezrati enmanigis al la Prezidanto la unuan grandan libron en Esperanto eldonitan en Israelo: "Verkoj de Heinrich Heine" de s-ro A. Holzhaus, Usono. Dum posta unuhora interparolo la Prezidanto esprimis sian simpation por nia movado. Kiel knabo li lernis la lingvon kaj komprenas ĝin ankaŭ nun.

Ross Photo, Jerusalem



LOKE

FR Germanujo

- Laŭ invito de la prezidanto de FR Germanujo, d-ro Gustav Heinemann, kvarpersona delegacio de la estraro de Germana Esperanto-Asocio havis aŭdiencon ĉe li en Bonn la 21an de septembro. Dum duonhora interparolo la ŝtatprezidanto montris viglan interesiĝon pri la Internacia Lingvo. Samtage la delegacio de GEA vizitis ankaŭ la Ministrejon pri Edukado kaj Scienco, kiu laŭ decido de la federacia registaro estas la instanco oficiale ŝargita pri Esperantaj aferoj.

Eŭropo

- La 5an de majo 1974 oni festos jam la 25an fojon la Tagon de Eŭropo. Okaze de tiu jubileo estas proponitaj diversaj specialaj popularigaj agadoj, eĉ la uzo de latinlingva slogano *Europa federata — hic et nunc* (Eŭropo federiginta — ĉi tie kaj nun) — latinlingva, por ne kaŭzi ĵaluzon inter la diversaj nacioj!

Brazilo

- Novan kurson de Esperanto oficiale starigis la Beletro Fakoj de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, universitato kun 8 000 studentoj. La kurso, 60-lecionhora, povis akcepti nur 30 lernantojn pro la limigita lingvo-laboratoria ekipaĵo, sed la interesiĝo estas tre granda, kaj dekoj da aliaj studentoj atendas starigon de novaj kursoj.

Aŭstrujo

- La aŭstra televido (ORF-FS 2), laŭ instigo de Aŭstria Esperanto-Movado, dissendis en la 16a de oktobro programon pri Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La prezenton de ekspozicia materialo antaŭis salutoj en la Internacia Lingvo kaj konciza priparolo de ĝia gramatiko.

Soveta Unio

- En 30 000 ekzempleroj aperis biografia rakonto ukrainlingva pri la konata blinda (Esperanto-)poeto Vasil Eroŝenko. La biografion verkis la prezidantino de Ukraina Esperanto-Komisiono, Nadia Andrianova. La libro, titolita *Mi ekbruligis fajron en la koro*, rapide disvendiĝas. Multloke en ĝia teksto estas parolo pri Esperanto.

- Post 40-jara paŭzo aperis nova lernolibro de Esperanto en Estonujo. Verkis Jaan Ojalo, redaktis Henrik Sepamaa (Seppik) kaj eldonis "Valgus". La eldonkvanto — 35 000 ekz. — superas la suman eldonkvanton de ĉiuj ĝisnunaj Esperanto-lernolibroj por estonoj. Intertempe alia estona ŝtata eldonejo daŭrigas la aperigadon de belliteraturaĵoj, el kiuj la unuaj estis *Kuŝanta tigro* kaj *Okupacio*.

Hungarujo

- Radio Budapest, en anglalingva elsendo de la 2a de septembro, pritraktis la Esperanto-movadon en Hungarujo el iom nekutima vidpunkto: sub la titolo *Manĝado en Esperanto* ĝi komencis la programon ĉe la konata restoracio "Esperanto" en Budapest.

Pollando

- La 10an de junio oni solene malfermis en Szczecin kafejon "Esperanto". Krom dulingvaj menukarto kaj informilo pri estontaj Esperanto-aranĝoj tra la mondo, ĝi havas ĉiutage funkciantan librostandon, gazet-angulon kaj informojn pri Esperanto.

Peruo

- Dank' al la subteno de nova membrino de UEA, s-ino Noemi de Jeri, Perua Esperanta Rondo sukcesis eldoni novan faldfolion pri Esperanto en 10 000 ekzempleroj.

GVIDADO

Ŝtatoj, politikaj partioj, komercaj entreprenoj, industrioj, unuiĝoj, societoj, ĉiuj organizaĵoj bezonas gvidantojn. Ju pli kapablaj la gvidantoj, des pli bone funkcias la movadoj, kiujn ili gvidas.

Ankaŭ nia movado — U.E.A., landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj lokaj societoj — bezonas plej taŭgajn homojn, virojn kaj virinojn, kiuj vere kapablas gvidi kaj progresigi la organizaĵojn, kiujn ili *estras*.

Jen sekvas kelkaj konsiloj por tiuj, kiuj plenumas gvidan rolon — aŭ deziras iam plenumi tian funkcion — en kiu ajn organizaĵo:

1) Diligente laboregi ne sufiĉas, se vi volas fari progresojn aŭ deziras *antaŭenigi* la entreprenon aŭ organizaĵon, por kiu vi *respondekas*. Zorgu, ke vi havu ĉirkaŭ vi kapablajn, *fakspertajn* kunlaborantojn, konsultu ilin kaj *interkonsiliĝu* kun ili pri ĉiuj iom gravaj decidoj. Tiru la maksimuman profiton el viaj propraj spertoj kaj el la spertoj, scio kaj kono de aliaj.

2) Klopodu ĉiam redukti komplikajn kaj *kompleksajn* problemojn al simplaj, fundamentaj aferoj. Simpligu!

Vi ne timu trarompi tradiciojn, nek renversi *enradikiĝintajn* kutimojn. La plej mallonga vojo inter du punktoj estas ĉiam la rekta linio. Ĉiam atentu la *efikecon* de viaj decidoj.

3) Sukcesa gvidado estas la suma rezulto de gvidanto plus kunlaborantoj. Gvidado, kiu ne inspiras, ne entuziasmigas, ne kapablas mobilizi fortojn, estas misgvidado. Plej ofte ĝi kondukas al fiasko. Neniu sukceso estas atingebla sen entuziasmo kaj *sindediĉo*.

4) Se vi havas ion por diri, formulu viajn vortojn koncize kaj klare. Evitu "*dikajn*" vortojn kaj pezajn esprimojn. La senvaloran enhavon de *mesaĝo* oni ne sukcesas maski per bela prezentado kaj peza *pakumado*.

5) Trejnu vian memor-kapablon, ĉar gvidantoj, kiuj devas ĉiam kaj daŭre konsulti siajn notojn kaj paperojn, impresas neserioze kaj facile eraras.

6) Evitu konfliktojn. Tio ne signifas, ke vi devas ĉion akcepti, ke vi estu "jes-ulo" aŭ flatemulo. Estu, kiu vi estas, kaj restu memfida. Lernu interrilati facile kun homoj de ĉiaj specoj, de ĉiuj rasoj kaj naciecoj. Ne havu antaŭjuĝojn.

7) Se vi devas paroli publike, parolu facile, glate kaj konvinke. Vi ne sukcesos "vendi vian varon", se vi ne unue kapablas "vendi vin mem". Se vi havas ion por ordoni, donu viajn instrukciojn klare kaj nemiskompreneble.

8) Penu pensi logike. Krome, vi klopodu pensi "grande", kio ne estas multe pli malfacila ol "pensi malgrande". La diferenco inter la du pens-manieroj tamen estas, ke "pensi malgrande" plej ofte rezultigas sensignifajn sekvojn dum la alia kondukas al grandaj rezultoj. Antaŭ ĉio, pensu *kree*. Imag-povo karakteri-

zas la veran gvidanton. Unu bona, originala ideo valoras pli ol cent *ĉiutagaĵoj*. Sukcesa gvidado estas senhalta procezo de renovigo.

9) La vera gvidanto devas okupi sin pri la estonteco, pensi pri la *morgaŭo*. Antaŭ ol li povas tion fari, li *unuavice* liberigu sin de la ĉiutagaj problemoj. Tiu, kiu daŭre rond-kuradas por solvi problemetojn kaj repacigi kverelantojn, ne trovas la necesan trankvilon kaj ripozon por serioze koncentriĝi pri la gravaj taskoj farendaj.

10) La vera gvidanto ne atendas, ĝis favoraj okazoj kaj situacioj sin prezentas, sed li kreas ilin, agas kaj planas tiel, ke ili estiĝu, por tiam *elprofiti* ilin plej efike.

Klarigaj notoj

estr-i: verbo, derivita de la sufikso "estr/o", kiu indikas la personon, kiu direktas, gvidas la aferon, menciitan de la radikvorto. (hotelestro, lernejestro, urbestro, ktp.).

Hotelestro estras (gvidas, direktas, funkciigas) hotelon.

antaŭ-e-n-ig-i: movi ion en antaŭa direkto; agi tiel, ke io moviĝas antaŭen; progresigi.

respond-ec-i: porti la respondecon; akcepti la sindevigon (sin-dev-ig-o/n) porti la sekvojn kaj konsekvencojn de sia agado; respondi. (Mi ne estas respondeca pri la fiasko de la entrepreno = mi ne respondekas pri la fiasko.)

fak-spert-a: derivita de "fako" kaj "sperta". Tiu kunmetita adjektivo signifas "sperta en difinita fako"; specialisto = fakspertulo. (La redakcio de la revuo bezonas fakspertajn kompostistojn = la redakcio bezonas homojn, kiuj posedas spertojn en la fako de kompostado).

inter-konsil-iĝ-i: la verbo "konsili" signifas "diri al alia persono tion, kion li devas aŭ devus fari laŭ la opinio de la diranto". Kiam du aŭ pli da personoj donas inter si konsilojn pri iu ajn afero, ili "interkonsiliĝas". (La kuracistoj interkonsiliĝis pri la kaŭzoj de la malsano de la paciento).

kompleks-a: malsimpla pro la multeco de faktoroj, kiujn oni devas prikonsideri.

en-radik-iĝ-int-a: fiksiĝinta firme (per radikoj) en io. Se la radikoj de kverko firme fiksiĝis sin (fiksiĝis) en la grundo, oni povas diri, ke la kverko firme enradikiĝis en la grundo. Same oni diras (metafore) pri ideoj, kutimoj, ktp. (Ĉe multaj esperantistoj la malmalmodernaj metodoj de varbado kaj informado estas tiel forte enradikiĝintaj, ke oni vane penas konvinki ilin, ke ili ne plu taŭgas en nia hodiaŭa socio).

efik-ec-o: reala, efektiva rezulto; efekto; eficienco. (La efiko (efikeco) de nia informado pri Esperanto ne estas en proporcio kun niaj klopodoj — Tiu propagando bonege efikis = havis bonegan efikon).

si-n-dediĉ-o: substantivo, farita el "dediĉi sin (al io-iu)"; doni-fordoni-oferi sin al iu afero. (Li fordonis sin al Esperanto = lia sindono, lia sinofero, lia sindediĉo al Esperanto).

dika(j) vorto(j): (metafore) pezaj vortoj, bombastaj vortoj.

mesaĝ-o: sciigo, informo, komunikaĵo (skriba aŭ parola).

pak-um-ad-o: pako = unu aŭ pli da pakitaj objektoj.

pakumo = materialo (papero, tolo, ligno), per kiu oni kovras (envolas) pakon por ĝin ŝirmi kaj/aŭ kunteni dum transporto.

(Li donacis al mi skatolon da pralinoj en multekosta pakumo. Eĉ malbelulino povas senti per ĉarma pakumado = per belaj vestoj).



59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 — 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotizoj de la unua periodo

Bonvolu atenti la preseraron sur la aliĝiloj por la 59a UK. Sur la dorsa flanko en la kotiz-tabelo, dua kolumno, devas esti ĝuste: Ĝis 31.12.1973 kaj ne 1974.

Konsisto de la LKK

Jam dum pli ol unu jaro laboras la Loka Kongresa Komitato. Sub la prezido de d-ro W. Bormann (estraro de UEA) aktive membras H. Schütt (vic-prez.), H. Wielgus (sekret.), M. Sudec (kas.), s-ino E. Sudec (helpkasistino), s-ino H. Lanka (loĝado), s-ro W. Bernhardt (ĝiĉetoj), s-ino E. Eggers (ekskursoj), s-ino E. Wielgus (prot. kaj artaj aranĝoj), d-ro A. Bormann (eksterlanda inform.), s-ino E. Bormann (enlanda inform.), E. Sörensen (junularo), s-ino E. Blasius kaj s-ino L. Hoffmann (infana kongres.), K.H. Hoffmann (blindula kongr.), s-ro J. Kühnel kaj s-ro T. Dieses (revizoroj), O. Hauser (ano).

Garantia Kapitalo

La kongreskomitato tutkore dankas al ĉiuj kontribuantoj kaj komunikas, ke la stato de la Garantia Kapitalo estas kontentiga. En unu el la venontaj komunikoj oni publikigos la finan sumon.

Plej nova eŭropa kongres-centro

La kongresejo de la 59a UK estos la moderna konstruaĵo de Congress Centrum Hamburg, finkonstruita en 1973, situanta en la koro de la urbo. Ĝi havas 17 salonojn por entute 10 000 personoj; la plej grandan povas frekventi 3 000 personoj. En la kongresejo okazos ĉiuj aranĝoj de la Universala Kongreso. Apude troviĝas granda restoracio kaj unuaranga hotelo.

Loĝado en Hamburg

Hotelĉambrojn la kongresanoj povos mendi ĉe la urba instanco, helpe de mendilo ricevota kun la Dua Bulteno. La LKK ne mem peros la ĉambromendojn! Je dispono estos ankaŭ ne tre multaj litoj en junulargastejoj k.s., kiujn la LKK deziras rezervi por partoprenantoj el landoj kun transpagaj problemoj. Sed ĉi tie validas des pli: Nur tre frua aliĝo kaj mendo garantias la realigon. Por kampadistoj kaj tendumantoj prizorgos la LKK (f-ino Hella Lanka, César-Klein-Ring 14, D-2000 Hamburg 71, FR Germanujo).



Ekskursaj aranĝoj

Kun la ĉirkaŭaĵo de Hamburg la kongresanoj konatiĝos dum la tuttagaj ekskursoj: unu trajne kun dancvagono kaj restoracio al baltmara strando, la alia ŝipe sur la rivero Elbe al la urbeto Glückstadt. En Hamburg mem ekzistas kompreneble abundo da vidindaĵoj: haveno, malnovaj kvartaloj, komercdomoj, lago kun promenboatoj, televidturo kun rava elrigardo, bestĝardeno ktp.

Varbafikoj de Beograd

Per esperantlingvaj prospektoj pri Hamburg, laŭmodaj varb-butonoj kaj afiŝoj propagandis la hamburgajn esperantistoj la Kongreson dum la ĉi-jara aranĝo en Beograd. La laboro rezultigis pli ol 100 surlokajn aliĝojn.

30a IJK en Münster

La Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en la semajno post la UK, de la 4a ĝis la 10a de aŭgusto 1974 en Münster. En formo de prelegoj kaj laborgrupoj la partoprenontoj traktos temojn rilate la celojn kaj vojojn de moderna eduka politiko. Por pliaj detaloj kaj aliĝiloj skribu al: U. Brandenburg, D-4401 Westbeven, Vadrup 276, FR Germanujo.

Ŝanĝoj en la listo de Kongresaj Perantoj

Francujo: (nova adreso!) Unuiĝo Franca Por Esperanto, 4 bis Rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.

Hispanujo: la ofico provizore vakas.

Israelo: (nova peranto!) S-ro Israel Israeli, str. Hercel 98, Tel Aviv.

Italujo: (nova adreso!) Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi 38, I-20143 Milano.

kre-e: adverbo, derivita de la verbo "krei". "Pensu kree" = pensu tiel, ke vi kreu ion. Pensu "kreive".

ĉiu-tag-aĵ-o: io (afero, diraĵo, ktp.), kion oni faras, aŭdas, diras ĉiutage. Banalaĵo, nenio nova.

morgaŭ-o: substantivo, derivita de la adverbo "morgaŭ". Sinonimo de "estonteco". Futuro.

unu-a-vic-e: en (je) la unua vico; unualoke; antaŭ ĉio cetera.

el-profit-i: tiri profiton el (io). Li tiris la plej grandan profiton el tiu situacio = Li elprofitis tiun situacion.



ESPERANTO EN RADIO

RADIO WARSZAWA krom la ĉi-supre anoncitan ĉiutagan programon prezentas "Anguleton por esperantistoj": 1) dum la germanlingvaj programoj dimanĉe de 21.00 h ĝis 21.30 h per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; 2) dum la svedlingva programo marde de 15.00 h ĝis 15.30 h per ondoj 200 m, 49 m; 3) dum la danlingva programo dimanĉe de 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 49 m, 41 m. La anguletoj estas kelkminutaj kaj pritraktas nur Esperanto-temojn.

BULGARA RADIO. El la stacio Sofia daŭre venas ĉiudimanĉe du elsendoj. Ĉiu programo konsistas el politika bulteno, enlandaj informoj, Esperanto-sciigoj kaj muziko. Aŭskultantoj povas peti dissendon de kanzonoj en Esperanto: la kantisto Mišo Zdravev havas je dispono dudekon da ili; oni ankaŭ povas peti elsendojn pri bulgara folkloro, proverboj, sporto ktp. La estraro de la stacio ŝatus, ke aŭskultantoj informu ĝin pri la aŭdebleco en diversaj landoj. Adreso: Radio Sofia, Esperanto-fako, Bulgarujo.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la julio-aŭgustan numeron.

BRITA RADIO. La prezidanto de Brita Esperanto-Asocio estis antaŭnelonge intervjuita en la franclingva servo de la brita radio-instanco B.B.C. Tio okazis rekte pro leteroj ricevitaĵe B.B.C. de francaj aŭskultantoj, kiuj demandis: 1) kial B.B.C. ne elsendas en Esperanto pro la amaso da francaj esperantistoj, kiuj ŝatus aŭskulti tiajn programojn; 2) kiom da esperantistoj ekzistas en Britujo kaj kio estas la ĝenerala sinteno pri la uzo de Esperanto. Estus bone, se esperantistoj en ĉiuj landoj skribus nacilingve al B.B.C. por fari tiajn demandojn, eble petante informojn pri la parlamenta grupo por Esperanto. Tiaj informpetoj certe kondukus al pluaj intervjuoj en la eksterlanda servo de B.B.C. kaj tre favore impresus la stabanojn de tiu instanco. Plue, necesas konvinki ilin, ke multaj homoj ĉirkaŭ la mondo entuziasmus pri elsendoj en Esperanto, kiuj alie ne aŭskultus la programojn de B.B.C. La adreso estas: British Broadcasting Corporation, World Service, Bush House, London WC2B 4PH, Britujo.

Kial la kotizoj altiĝos

Klarige al la membroj

Kiel vi aliloke jam povis legi, la kotizoj por individuaj membroj de UEA plialtiĝos ekde 1974. Tiun decidon faris la Komitato en Beogrado, laŭ la propono de la Estraro. Ĉiu scias, kiel ĉie en la mondo la kostoj — kalkulitaj en monunuoj — daŭre plialtiĝas. Tial, en la pasinteco la kotizoj estis plialtigataj, i.a. en 1964, en 1967 kaj en 1970.

Post la decido de plialtigo ekde 1970, mi publikigis en la novembra numero de *Esperanto* (1969) klarigon kun pluraj ciferoj pri altiĝoj de salajroj en 10 landoj. Nun kvar jarojn poste vi ĉi-sube trovas ciferojn, kiuj formis la bazon por la propono de la Estraro kaj la decido de la Komitato.

La ciferoj akireblaj ĉe la Centra Oficejo de Statistiko en Hago — escepte de tiuj pri Nederlando — estis statistikoj nur ĝis aprilo 1972; ili tamen donas klaran bildon pri la evoluo, kaj ne estas ia kaŭzo supozi, ke tiu evoluo ne daŭras en 1973, nek daŭros en 1974.

Jen la indicoj pri evoluo de salajroj en industrio:

Jaroj	1964	1967	1970	1972	1973
Landoj				apr.	apr.
Belgujo	100	131	170	206	
Britujo	100	126	170	198	
Francujo	100	122	171	201	
F.R. Germanujo	100	124	166	191	
Italujo	100	124	179	226	
Jugoslavio	100	215	305	400(1971)	
Nederlando	100	132	180	221	236
Svedujo	100	122	143	167	
Usono	100	113	134	153	

RESPONDAS LA ESTRARANO PRI FINANCO

Ĉar ne ĉiuj el vi precize memoras la evoluon de la kotizoj de UEA, mi publikigu ankaŭ ilin (same indico, kiel la kreskadon de salajroj en landaj monunuoj).

Jaroj	1964	1967	1970	1972
Landoj				
Belgujo	100	126	156	156
Britujo	100	125	175	175
Francujo	100	125	164	179
F.R. Germanujo	100	125	129	129
Italujo	100	125	147	156
Jugoslavio	100	162	235	353
Nederlando	100	125	150	150
Svedujo	100	125	143	143
Usono	100	125	140	155

El tiuj du statistikoj sekvas, ke la altiĝoj de la kotizoj en la jaroj 1964 ĝis inkluzive 1972 por preskaŭ ĉiuj landoj restis sub la altiĝoj de la salajroj kaj en pluraj landoj restis multe sub tiuj altiĝoj. La unusola escepto estas Usono. Tie la kotizoj iom pli altiĝis, ol la salajroj. Sed, ĉu oni ne rajtas konstati, ke kompare kun la vivnivelo en Usono la kotizoj en 1964 estis vere tre malaltaj.

La elspezoj de UEA konsistas ne nur el salajroj; tamen la salajroj kune kun la rekte kun ili ligitaj sociaj asekuroj formas 63% de ĉiuj kostoj. Krome ankaŭ la aliaj elspezoj grandparte dependas de la nivelo de la salajroj en Nederlando.

Rilate al salajroj mi ankoraŭ menciis, ke en Nederlando aparte grave plialtiĝis la devigaj minimumaj salajroj por ĉiu, kiu havas 23 jarojn aŭ pli. Ekde julio 1973, tiu minimumo estas 985,40 gld. monate mal-

OFICIALA INFORMILO

N-ro 471, 1973-09-01

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Casini, B., Italujo.
Goedhart, F., Nederlando.
Hammer, J.K., Nederlando.
Alamo-Sandgren, s-ino A., Svedujo.
Anderson, F.C., Usono.
Liwszyc, d-ino M., Usono.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ


290 D. Lorenzin, Aŭstralio. 291 N. Aydos Kriger,
292 B.F. Farias, 293 Maria Julia J.R. da Cunha,
294 E.P. Nunes, Brazilo. 295 D. Birkett, Britujo.
296 W. Wingen, FR Germanujo. 297 A. Kriek, 298
W. Spaander, Nederlando. 299 S. Szejnman, 300 H.
Alderin Leijder, 301 D. Ellard, 302 H.A. Krona,
Svedujo. 303 D.W. Ellis, 304 T.H. Spencer, Usono.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1973-11-15 neniuj membroj protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Ĉeĥoslovakujo: Ivan Štefanisko, D Jedlinka, Josef Hradil, D kaj FD Mnichovo Hradiště. **Francujo:** Roberto Frus, FD Nîmes, Jacques Manceau, D kaj FD Saintes. **FR Germanujo:** Franz Kruse, D kaj JD Lohne/Südlohne. **Grekujo:** Anastasia Eliopulu, VD kaj FD Nea Smirni, Kimon Eliopulos, FD Nea Smirni. **Israelo:** Charles Armony, FD Haifa. **Japanujo:** Jukijoŝi Muramacu, FD Tokyo. **Italujo:** Federico Gialanzé, FD Bergamo. **Nederlando:** Felix H. Kat, D Beekbergen, Ineke Emmelkamp, JD Groningen, Audrey C.E. Childs-Mee, FD Rotterdam, Piet Buijnters, FD Tilburg, Gerrit Kalkman, FD Vlaardingen. **Norvegujo:** Olav Reiersøl, FD Oslo. **Sovet-Unio:** Boris Kolker, Ufa. **Svedujo:** Anders Jägervall, FD Lund.

DR E. J. WOESSINK



nete (cetere oni nun konsideras baldaŭan denovan plialtigon). Tiu deviga minimumo, enkondukita en 1969, indice evoluis jene:— 1969:100, 1970:108, 1971:122, 1972(aprilo):129, 1972(decembro):136, 1973(aprilo):149 kaj (julio):156.

Kotizo MA 1974

La jara kotizo MA (membro-abonanto) do fariĝos ekde la 1974a jaro 40 gld. Kiom tio estas en la monunuoj de aliaj landoj, vi legis en la septembra numero (p. 159). Vi nepre pripensu, ke en neniuj internacia organizaĵo — kiu ne havas subvencion de ŝtato(j) — oni ricevas tiom por sia kotizo kiom ĉe UEA: revuon, jarlibron, rabaton de kongresa kotizo kaj diversajn servojn; krome, morale plej grave, internacian solidarecon en laboro por la homaro.

Tamen estontece senzorga?

Ĉu tio eblas rilate al la kotizoj por UEA? Jes, se vi disponas iom da mono, vi povas fariĝi DM (dumviva membro) de UEA. Tiu dumviva membreco kostas sumon egalan al 20-oblo de la jara kotizo MA. Tio signifas, ke ĝis la 31a de decembro 1973 vi ankoraŭ povas fariĝi DM de UEA per pago de 20×30 gld. = 600 gld. (ekde 1974 tio fariĝos 800 gld.), per kio vi kaj UEA povas havi jenajn avantaĝojn.

- Vi:
- a) ne plu zorgoj pri kotizaltiĝoj
 - b) ne plu zorgoj pri forgeso de ĉiujara pago
- UEA:
- a) ne plu administraj laboroj pri kotizoj
 - b) pli firma bazo de la konstanta membraro.

Dum la lastaj jaroj la nombro de DM rimarkinde kreskis. Vi eble jam foje pensis pri dumviva membreco, sed ankoraŭ ne decidis. Por viaj avantaĝoj vi nun faru la decidon! *

* Vi povas pagi rekte al unu el la kontoj de UEA. Vidu la paĝon 11 de la Jarlibro 1973/I.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1973, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Angola: Luanda. **Belgujo:** Andrimont (D kaj JD), Bruxelles (FD farmacio). **Brazilo:** Além Paraíba, Belém (FD edukado), Pindamonhangaba, Rio de Janeiro (FD instruado: portugala lingvo, FD literaturo), São Paulo (FD laborleĝoscienco), Umuarama. **Britujo:** Hailsham, Horley. **Bulgarujo:** Pleven (VD kaj FD komerco), Sofia (FD gastigado kaj instruado). **Ĉeĥoslovakujo:** Český Dub, Hodonín (VD), Košice, Přelouč. **Ĉinujo:** Tientsin. **Danlando:** Aabenraa. **Finlando:** Helsinki (FD geodezio kaj PTT: radiotelegrafio, Kangasala, Lauritsala (D), Nurmee, Tampere (FD modo: virinaj ĉapeloj), Turku (FD fotografio). **Francujo:** Joeuf. **FR Germanujo:** Biberach/Riss, Biebrich, Frankfurt/Main (FD I. Chiussi), Karlsruhe (D kaj FD ŝako), Recklinghausen, Soltau (FD edukado), Walsrode, Wiesbaden (FD sociallaboro). **Grekujo:** Athinai (FD medicino kaj religio: teologio). **Hispanujo:** Lerida, Madrid (FD muziko), Zaragoza (VD). **Hungarujo:** Oroszlány, Székesfehérvár (FD sonbendoj). **Irano:** Teheran (VD). **Italujo:** Cuorgné, Firenze (JD kaj FD grafologio), Napoli (FD laboristaj aferoj). **Japanujo:** Okayama. **Jugoslavio:** Kaštel-Novi, Knežev, Sarajevo (VD kaj FD speleologio), Varaždin (JD). **Kanado:** Pierrefonds, Victoria (D). **Koreujo:** Seoul (VD). **Liĥtenstejno:** Schaan. **Malagasa Resp.:** Tananarive (D). **Nederlando:** Eindhoven (FD aŭtomatoj), Heelsum, Goudriaan, Renkum. **Norvegujo:** Sarpsborg (VD kaj FD komerco). **Pollando:** Bydgoszcz (FD studentaj aferoj), Chorzów (D), Gliwice, Kraków (FD sociologio), Milanówek (FD instruado: Esperanto kaj kemio), Minsk-Mazowiecki, Pierściec, Toruń (D), Warszawa (FD tajloraj aferoj). **Rumanujo:** Sf. Gheorghe (D kaj FD matematiko), Sulina. **Sovet-Unio:** Batumi, Kiev (filatelo, pentrarto), Moskva (VD Oktjabrskij r-n kaj FD filozofio, virinaj aferoj), Riga (VD Andžans kaj FD ŝako), Vilnius. **Svedujo:** Helsingborg (D, FD kontraŭalkoholismo kaj turismo), Höganäs, Malmö (FD socialaj aferoj). **Usono:** Binghamton, Cleveland. **Venezuelo:** Caracas (FD muziko).

DONACIOJ 1973 (Gld.)

Fondaĵo Azio-Afriko: FRG.: G. Schmidt, 106,88. Sumo ĝisnuna: 221,80.

Fondaĵo Canuto: FRG.: G. Schmidt, 106,90. Svedujo: Y. Cederholm, 100,—. Sumo ĝisnuna: 2.330,30.

Ĝenerala Kaso: Britujo: A.T. Pilley, 5,—. FRG.: H. Sörensen, 8,15. Nederlando: R. Moerbeek, 5,21. Anonima: 20,—. Sumo ĝisnuna 1144,38.

Kampanjo 100 x 100 (por ke 100 personoj devigu sin donaci ĉiujare dum 3 jaroj ek de 1971 po 100,— gld. aldone al la kutimaj kotizoj kaj donacoj):

Sumo donacita por 1971: 5 300,— gld.

Sumo donacita por 1972: 6 600,— gld.


Sumo ĝis nun por 1973: 4 101,12 gld.

Propaganda konto: FRG.: G. Becker, 269,—; W. Heide, 8,45; G. Schmidt, 106,88. Nederlando: A. Kriek, 12,—; W.H. Mook, 25,—; f-ino S.A.K. v.d. Zee, 10,—. Sumo ĝisnuna: 467,15.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto Asocio

ANONCETOJ



Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respond-kupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.

Ĝeamikojn por interŝanĝo de E-filatelaĵoj, E-insignoj kaj E-flagetoj serĉas 22-jaraĝa fraŭlo Vláša Hasala, S.K.N. 37, CS-695 03 Hodonín, Ĉeĥoslovakio. Respondo certa.

Ni deziras havi kontakton kun alilandanoj, kiuj laboras en japana entrepreno, por interkompreno: Ni estas kontraŭ t.n. japana neokoloniismo. "Studrondo pri egalrajto de mondpopolanoj", adreso: ĉe Tezuka, Seifūsō-25, Ogikubo 3-22-12, Suginami, Tokio, Japanujo.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK-5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amatoroj Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Se vi havas vendeblajn ekz. de Esp. revuoj kaj libroj, bv. skribi al s-ro Ramon Molera — str. Sta. Joaquina, 13 — Moyá (Barcelona) — Hispanujo.

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA). Kongreso okazos la 21an, 22an kaj 23an de junio 1974, en Spokane, Wa, Usono. Samtempe kun la Mond-ekspozicio (EKSP0 '74), samurbe. Por inf. skribu al: H.K. Ver Ploeg, E. 321 - 19th Ave., Spokane, Wa 99203, Usono.

En multaj landoj 2% de la enloĝantaro suferas pro la ne-infekta haŭtmalsano psorazio. La adreso de ĉiu landa asocio por suferantoj estas havebla de: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Anglujo.

Amikajn grupojn serĉas Ŝinagaŭa Esperanto-Societo, Tokio. Volontuloj kontaktu kun IWAYA Mituru, Nibantyo-7-202, Tiyoda-ku, Tokio, Japanujo.

Novaj esperantistoj volas korespondi kun la mondo pri diversaj temoj. Se vi interesiĝas bonvolu kontakti: S-ron T. Maby, 5 John Bold Avenue, Stoney Stanton, Leicestershire, Britujo.

Heleno Fantom (antaŭe Prent) kaj Ian Fantom sciigas sian post-geedziĝan adreson: 87 Castle Road, Bedford, Britujo.

Danĉo Stojĉev, Sofia 26, Bulgarujo, Kv. Vitoŝa, str. 822, No 30, juna esperantisto, dez. kor. kun gejunuloj 21-jaraj, pri muziko, literaturo kaj turismo.

Broŝuro **La vizio de la Monaĥejo en Kioto** (13p. 18cm x 25cm) de S-ro Hiuga-Y., tradukita de S-ro Nisida-R. el la japana, aperis.

La Monaĥejo estas Budhismo, sed ne rifuzas Kristanon. Kioto (Kyôto) estas antikva ĉefurbo de Japanujo. La Fondinto, S-ro Hiuga-Y., neseĝtano, estas profeto.

Senpage vi ricevos la broŝuron per ŝippoŝto (unu monaton necesas atendi). Bonvole petu al S-ro Nisida-Ryôya, Saihōzi, Goken'yamati, 7-2, 596. KISIWADA-SI, Japanujo.

3-A VINTRA ESPERANTISTA FERIO EN BUDAPEŝTO

28.12.1973 — 02.01.1974

El la programo:

URBORIGARDO, VIZITOJ EN MUZEOJ,
ESPERANTO-SEMINARIOJ, TUTTAGA
EKSKURSO PROVINCON.

INTERNACIA SILVESTRA BALO, ktp

Kvarkoloran, 16-paĝan

programkajeron kun invitilo

senpage sendas la organizanto:

Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA

1443, Budapest, Poŝtkodo 153



**"ĈIU ESPERANTISTO ĈIAM PORTU
LA ESPERANTAN INSIGNON (NE
MULTAJN, SED UNU)".**
— Principaro de Frostavallen

Bikiniformatan eldonis UEA: diametro
8mm, pinglolo 43 mm; verda, filikeca
stelo sur blanka fono. Prezo: 1,62 gld.
(por Nederlando 1,85) + sendokostoj 10%.

Ĝus aperis N° 1 de

LA TORNISTRO

(por instruoj kaj por distro)

Literatura jarkajero kun tre varia enhavo: artikoloj,
poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, ktp., kun multaj
ilustraĵoj.

52 paĝoj — 22 cm. Prezo: 5 gld.

Mendu ĉe UEA, aŭ ĉe Argentina Eo-Instituto,
C.C. 58, Suc. 12, BUENOS AIRES (Argentino)

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj
Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de UEA


(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subten-
anta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esper-
anto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)



Ĉu vi konas la kultur-revuon

NORDA PRISMO?

Se ne; petu provnumeron!

Se jes; abonnu kaj igu aboni ĝin!

Jarkolekto: 25 d. kronoj.

Mendo: P. B. 952, DK 2400 NV.

Pago: Per ĝirkonto 905 55, DK.

aŭ per Landmandsbanken, DK 2900.

1973

Dek-oka
jaro

Bona ideo . . . por viaj peltaĵoj
ĉiukaze rigardi en la plej granda kaj plej
malmultekosta peltvendejo de Nederlando.
Miloj da mallongaj kaj longaj

PELTMANTELOJ

peltaj ĉapeloj kaj kolumoj kontraŭ allogaj,
malaltaj, pageblaj prezoj!
Aĉeti peltaĵon baziĝas sur fido. Trijara garanti-
atesto indas tiun fidon. Pli da garantio por pelto.
Laŭdezire tre flekseblaj kreditkondiĉoj.

DE BONTKONING, Hoogstraat 97,
Rotterdam-C, tel. (010) 117.117. Granda aŭto-
parkejo antaŭ la magazeno.

Ĉe aĉeto por du personoj: repago de kostoj de
vojaĝo en Nederlando per aŭtobuso, vagonaro
aŭ propra aŭto. Do vojaĝo senpaga.
Vendredvespere malfermita ĝis la 21.00 h.

Amikeco trans limoj

Foto-poŝtkartoj por la
Semajno de Internacia
Amikeco kaj aliaj okazoj.
Eld. UEA. 2,50 gld. (por
Nederlando 2,90 gld.) por
10 ekzempleroj.
Sendokostoj 10 procent.



NI
EBLE
GASTOS
ĈE VI

...se vi fariĝos
gastiganto
de TEJO

pasporta servo

72 rue de Rennes, F-75006 Paris, Francio



**Vi trovos pli
bonan
kvaliton
ĉe
ni**

U.E.A. nun disponas pri kvanto da gramofondiskoj de klasika muziko. La prezoj estas tre favoraj: 8,10 aŭ 9,— gld. (por Nederlando 9,40 aŭ 10,45 gld.) plus sendokostoj 10% kaj la diskoj estas bonkvalitaj. La tekstoj sur la kovriloj estas en diversaj naciaj lingvoj (NE en Esperanto!).

Inter la diskoj, kiujn ni jam havas, troviĝas verkoj de Bach, Beethoven, Dvořák, Haydn, Mozart, Schubert kaj Schumann; inter la artistoj estas Anĉerl, Arrau, Haitink, Munclinger, Navarra kaj Ojstraĥ. Ĉiun titolon kontrolas, laŭ teĥnika kaj artisma vidpunktoj, gramofona fakulo, antaŭ ol ni aperigas ĝin en la katalogo. Depende de la reago, la elekto-eblecoj povus fariĝi ankoraŭ pli vastaj: jam nun ni volonte serĉus kontraŭ mendo aliajn diskojn el Ĉeĥoslovakujo, Germana Dem. Resp. aŭ Polujo.

Detalan liston de la diskoj jam haveblaj oni povas ricevi kontraŭ respondkupono ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.